

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA  
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONA

CHESTERTON, eminentísimi homo stultus, homo stultissimus, ignorant de l'Esperanto, en la sessió del P. E. N. Club de Catalunya a son honor, digué unes quantes nícieses sobre la llengua internacional. Després de recomanar al gros paradoxista anglès «L'homme stupide», editat per E. Flammarion, 26, Rue Racine, París, de l'honest coneixedor de l'Esperanto Charles Richet, distingit amb el Premi Nobel per a la Ciència, li aconsellem de reflexionar tot el substanciós article «Una Llotja en el Circ», del nostre amic JOAN SACS, publicat a «La Publicitat» del 15 juny, motivat per la vinguda de Chesterton a Barcelona, que diu entre altres consideracions: «Cal saber veure al primer cop d'ull la falàcia; cal no deixar-se enllepolir massa per l'humorisme que condimenta freqüentment la literatura paradoxista. Aquesta és la condició de l'asaboriment d'aquest gènere literari imposat pels escriptors anglesos, aquesta literatura que els mateixos anglesos han anomenat «fiction». Perquè el paradoxisme anglès és, més que filosofia, un gènere de «fiction», més curtet, però més intel·lectualista que la novel·la, gènere propi per a magazines, diaris i revistes d'amena intel·lectualitat.

L'humorisme que assaona el paradoxisme està ja molt lluny de l'«humour»; perquè l'«humour» volia dir moltes coses substancioses, mentre que el paradoxisme cerca justament a desdir coses substancioses i a substituir-les per una mixtificació. L'humour extreia de la vida la paradoxa vivent i la matava, o bé en matava el verí. El paradoxisme posa una paradoxa d'invenció i la fa empassar al públic babau». Si el paradoxista aconsegueix de fer empassar la seva gratuïta paradoxa a un públic que s'estima cultivat, aleshores l'ensarronador podrà estar content del seu propi talent. — Però, i si aquest triomf prové d'una curtedat de gambals del seu públic, qui podrà estar content aleshores?»

La bone konata kaj en ĉiuj landoj uzata

## BES - Adresaro

de esperantistoj el ĉiuj landoj  
aperos denove — jam en 6-a. eldono — aŭtune 1926.

### ALIĜU SENPROKRASTE!

Simple aliĝo 0.25 fr. sv, aliĝo kun adresaro 0.50 sv. fr, publikigo de  
portreto 0.50 sv. fr, anonca linio 0.25, 1 sv. fr. = 1.20 pes.

## BOHEMA ESPERANTO-SERVO

Moravany v. Ĉ.

Ĉeĥoslovakujo

---

## APUDMARA RENKONTEJO ESPERANTISTA

(CANNES, CÔTE D'AZUR, FRANCUJO)

Jam antaŭ unu jaro, en la Franca Esperantista Kongreso de Clermont-Ferrand, S-ro André Moussier el Vienne Isère Francujo, esprimis al kelkaj samideanoj ideon organizi «Apudmaran Renkontejon» (La Plage Esperantiste).

Provizora Komitato starigis sub la Prezidanteco de S-ro G. ROY, delegito UEA en Gaillac s/ Tarn. S-ro Cresp, delegito UEA en Cannes konsentis igi sekretario. Donacemaj samideanoj disponigis al komitato monon por aranĝi tiun someran renkontejon en Cannes.

La entrepreno ne estas komerca. Ĝia principo estas «Unu por ĉiuj, ĉiuj por unu».

De kelkaj jaroj, Cannes fariĝis somera marbordo. Ĝia temperaturo en Aŭgusto ne superas 28 gradojn C. La marbordo estas el maldika dolĉa sablo. Amuzajtoj: Teniso, ŝipkurado, banoj, urba muziksocieto de 50 ludantoj. Ekskursoj piede, vagonare kaj aŭtomobile.

Organizita servo por la vizito de la proksimaj urboj, insuloj, montoj. Esperantista ĉambrego por kunveni, habeladi, muzikadi.

Hoteltago de 25 francaj frankoj. Rabato laŭ la daŭro de la restado. Jam sin enskribigis kelkaj samideanoj por la semajno 22-28 Aŭgusto kiu estos la «Esperantista Semajno».

Pri informoj demandi Sinjoron Ch. Cresp, 14 Rue du Docteur Gazagnaire  
CANNES. Alpes Maritimes. Francujo.



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ  
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gitaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH JOFRÉ

## La XIII<sup>a</sup> Kongreso de K. E. F. Santa Coloma de Farnés — Majo 1926

Sukceso: pro entuziasma akcepto kaj festeno, pro paca interparolado kaj decido pri utilaj aferoj; pro solenaj Floraj Ludoj, pro beleco de Reĝino kaj korteganinoj, pro ĉeesto de la ĉefa premiita poeto, pro ĉiuj detaloj, agrablaj, favoraj, kaj neniu malplaĉa, kontraŭa.

Ĉeestas la fama organizinto de nia Kongreso en Palma de Mallorca, la Reĝino de la XIaj Floraj Ludoj, kaj ĉiuj pioniroj de nia movado en nia teritorio. La urbestro de Santa Coloma estas malnova samideano kiu elokvente alparolis la kongresanojn en Esperanto. Ankaŭ urbkonsilanto de tiu ĉarma urbeto estas malnova kara samideano.

En la laborkunsidoj ĉiuj partoprenantoj flue kaj korekte diskutas en Esperanto honore al nia internacia lingvo kaj al ĉeesto de nia fama samideano Direktoro de «Heroldo de Esperanto» — Bedaŭrinde ambasadoraj baroj malebligis la ĉeston de nia hungara kamarado en Paris, S-ro. Jozefo Major.

La fondo de Kataluna Esperanto-Instituto, la nomigo de Delegito de K. E. F. por ĉiu urbo kie estas esperantistoj, la nomigo de du voĉdonantoj de la Komitato de K. E. F. por la katalunlingva teritorio Baleara, ekzamenoj pri kapableco kaj profesoreco de Esperanto, kaj aliaj efektivaj estas pruvoj pri la vigleco de nia movado, pri la efiko de nia Federacio, pri la sukceso de nia Kongreso en Santa Coloma de Farnés,

### Popola akcepto

La lernantaro de la publikaj lernejoj de Santa Coloma orde staras sur la vojo por akcepto al la kongresanoj. Atende al ni estas ankaŭ en la stratoj de la urbo publiko, popolo. Inter ni estas standardoj de kelkaj Grupoj el Barcelona kaj aliaj urboj, kaj agrable, ĝoje renkontiĝas ĉe la alveno malnovaj samideanoj kaj pioniroj eĉ el Palma, eĉ el Horrem bei Köln. Petas por silento organiza komitatano, kaj salutas nin per kanto de «La Espero» la nomita lernantaro. Ni kore dankas per aplaŭdo kaj piediras tra la urbeto al la Urbodomo kie okazas:

### Oficiala akcepto

La Urbestro, malnova batalanto por nia Movado, en la nomo de la urbo bonvenige salutas nin per elokventa kaj korektega Esperanto. Katalune danke respondas la Prezidanto de K. E. F. en la nomo de la kongresanoj, kaj nin salutas la poeto-reĝo de la XIIaj Floraj Ludoj, elveninta el sia lando, nia germana amiko Teo Jung, per la jenaj frazoj:

«Tre estimataj gesamideanoj, karaj kunbatalantoj por nia granda ideo!

Mi havas la honoron saluti vian Dektrian Kongreson en la nomo de *Germana Esperanto-Asocio*, de *Rejnlanda-Vestfalia Esperanto-Ligo*, de *Esperantista Literatura Asocio* kaj de la redakcio de *Heroldo de Esperanto*.

Volontege mi sekvis la afablan inviton de la komitato de via Kongreso kaj ĝoje alrapidis de la ĉarmaj bordoj de l' Rejno trans la vastajn kamparojn de Francujo kaj trans la Pireneajn montgigantojn al via bela Katalunujo por partopreni vian Kongreson kaj viajn Internaciajn Florajn Ludojn en tiu ĉi admirinde lokita urbeto.

Mi ĝojas, ke mi nun povas persone konatiĝi kun la anoj de tiu popolo, kun kies animo mi jam konatiĝis per la verkoj de viaj famaj poetoj tiel majstre interpretitaj de via samnaciانو s-ro Grau Casas en la *Kataluna Antologio*, kiu estas ĝis nun unika verko en la traduka Esperanta literaturo kaj kiu povos servi kiel modelo por ankoraŭ sekvontaj antologioj de aliaj nacioj.

Jam antaŭ du jaroj vojaĝinte en la Sudo de Eŭropo, en Dalmacio kaj Italujo kaj sur la Adriatika Maro, kiom mi sopiris revidi kaj ree ĝui, enmeze de kara samideanaro, la senmakulan bluecon de la suda ĉielo, la same intensan bluan de l' vasta Mediteraneo, kaj la varman, ĝojon portantan sunon! Dank' al via afabla invito, karaj gesamideanoj, kaj dank' al via komplezemo mia sopiro nun estas plenumata: Ree volbiĝas super mi la bela blua ĉielo kaj ree min karesas la varma suno de l' sudo. Tio donas al mi ĝojon kaj feliĉon, kaj la saman ĝojon kaj feliĉon mi legas ankaŭ en *viaj* okuloj.

Vi ja kunvenis por kongresi pro nia alta idealo, pro nia kara *Esperanto*; vi kunvenis por renkonti ĉi tie amikojn kaj samideanojn, por reciproke preni viajn manojn, por interŝanĝi viajn pensojn kaj ideojn, por elŝuti vian

koron plenan de idealismo kaj altaj sentoj, por entuziasmigi unu la alian kaj entuziasmigi unu je la alia kaj por, post la Kongreso, disiri kun *nova fervoro*, nova kuraĝo, nova forto kaj kun la firma volo, daŭrigi la bataladon por nia grandioza, kulturprogresiga ideo, ĝis la fina venko estos atingita!

En tiu senco mi deziras al via Kongreso grandan sukceson!»



## Malferma Kunsido

En la ĉefa salono de la urbdomo okazas ankaŭ la unua kunsido de nia Kongreso. Kiel tradicie la Prezidanto legas raporton pri la funkciado de K. E. F. en la lasta interkongresa periodo. Jen la

### *Raporto de la prezidanto de K. E. F.*

«Superflua estus nuna detalado pri nia agado en la lasta periodo de nia Federacio, pri la antaŭa Kongreso en Palma, neforgesebla, nesuperebla, por kies heroo mi proponas ke ni ĉiuj esprimu en ĉi-tiu feliĉa okazo rehavi lin kun ni, simpation kaj dankemon per forta ĉies aplaŭdo, — ĝis hodiaŭ. Laŭ la aferoj estas direblaj sub la nuntempa reĝimo, ili estas diritaj en nia gazeto. Mi simple akcentos kaj memorigos kelkajn faktojn, kiuj tion meritas.

La nova organizo de K. E. F., la fervoro, la oferemo, kaj la lerteco de miaj kunkomitatoj, la favoraj por Esperanto postmilitaj cirkonstancoj kaj atmosfero k. c. permesis al nia Federacio efektiviĝi solidarecon kaj fortikecon de nia movado en nia teritorio, unuigi la elementojn subtenajn necesajn por la granda verko de la Katalunlingva esperantistaro, por la glora Kataluna Antologio, por kies kompilinto kaj ĉefverkinto Jaume Grau Casas ni devas nun danke aplaŭdi. Ni atingis sendeficitan situacion de K. E. F., kaj eĉ devis kaj povis, *lecionige*, *hontige* por nia malamika iu, pagi monpupon, pro... kaj por... ni tion siatempe dece klarigos. Ni ne plu povas diri pri tiu afero hodiaŭ.

Fakto vere rimarkinda estas la nuna graveco de la Kataluna Esperantista Federacio, ne nur por nia teritorio, sed ankaŭ por la Universala Movado; Ĉirkaŭ tridek kvin subtenantoj estas en la Mondo por la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado — nia Federacio estas unu el ili. Estas ĉirkaŭ 15 pagantaj membroj de la Konstanta Rezentantaro de la Esperanto-Movado — Nia Federacio estas unu el ili. Estas en Esperantujo pli malpli dudek regulaj korektaj esperantaj gazetoj — *Kataluna Esperantisto* estas unu el ili. Ĉiujaraj naciaj gravaj kongresoj okazas multaj — la nia estas el la plej sukcesaj kaj solenaj. Konkursoj por literatu-

raĵoj estas provitaj kelkaj en Esperantujo—konstanta, plej internacia, plej fruktodona pruviĝis unu: la Floraj Ludoj.

Raportoj pri nia centra internacia Movado atestas pri la reprezentiteco de K. E. F. en ĉiuj.

Karaj K. E. F-anoj, Grupoj kaj amikoj, ĉu K. E. F. ne laboras por Esperanto plej vigle? Aldonu ankoraŭ ke tion kaj plu ni faras sen favoro de registaroj kaj eĉ monpunigitaj kaj kalumniitaj de sin nomantaj samideanoj, kiujn ni ne malamas sed kompatas. Kompatindaj estas la homoj kiuj per unu klopodo defendas esperantismen, kaj per alia kontraŭstaras esperantismen. Sed rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante, ni iras la vojon celitan.

Aproboj kaj laŭdoj de samideanoj hispanlingvaj kiuj konas nin kaj nian agadon, certigas pri nia deca agado rilate al la hispanlingva samideanaro. Aproboj kaj laŭdoj de ĉiulandaj samideanoj kiuj vidis nian laboron certigas pri ĝia deca en la ĝenerala Movado.

Mi devas nun laŭdi kiel esperantisto la kunlaboron de la urbestro de Santa Coloma, kiu ĉiam estis amiko de K. E. F., kaj en la nuna okazo li tion evidentigis de sia aŭtoritateco en tiu ĉarma urbo per efektiva helpo al la Loka Komitato de la nuna Kongreso. Laŭdegone meritas la membroj de la Loka Komitato, kies tasko silenta, longa, humila estus neelporbla de samideano ne tre fervora.

Dum la pasinta periodo la Direkta Komitato de K. E. F., malgraŭ kelkaj individuaj lacigoj aŭ faletoj aŭ devigaj forigoj, alvenis la finon proponinte publike per nia gazeto helpon al ĉiuj Grupoj, kaj plenuminte la proponon por ĉiuj kiuj akceptis ĝin. Eksterkomitate efike helpis nin la kamaradoj S. Alberich, D-ro. Bartomeu, Valdepeñas, Bofill, Comadran, Ratés, Pastro Casanovas, D-ro Bremon, Artur Domènec, Santamarina, D-ro. Torres Carreras, D-ro. Figuerola, D-ro. Orriols, Pruna, k. a. Publikan dankon al ĉiuj.

Nun ĉesos kelkaj aŭ ĉiuj lastperiodaj komitatanoj de K. E. F., laŭ ĉies ebleco, kaj laŭ volo de la kongresanoj membroj rekte de K. E. F. aŭ de Grupo apartenanta al K. E. F. — Nun vi aprobu aŭ malaprobu nian taskon en la responda Kunsido. Eĉ admonu kuraĝe, libere, tiun aŭ tiujn komitatanojn kies agado ne plaĉis al vi; sed ne konfuzu la Komitaton kun la Federacio. La Federacio estas vi kaj ni. La Komitato estas personoj iuj aŭ aliaj. La Federacio estas la necesa organizaĵo por la defendo kaj venko por nia sankta afero en nia lando. Amo al nia idealo gvidu nian kongresan laboron».

### *Salutoj kaj Delegitoj*

Telegramo de F-ino. Palmira Castellví.

» » "Paco kaj Amo"

» » "Empordana Ebenaĵo".

Letero de la Provinca Deputitaro sciiganta pri subvencio da 200 ptoj. por la Kongresaj elspezoj.

S-ro. Bofill salutas reprezente de la jenaj Grupoj balearaj:

«Esperantista Klubo Palma»

«Esperantista Grupo Solleric»

«La Verda Stelo» el Consell

«Bela Espero» el Binisalem.

kaj «Esperantista Grupo» el Capdepera.

S-ro. Capdevila,        reprez. de «Barcelona Stelo»

S-ro. Valdepeñas       »       » «Barcelona Esperanto-Societo»

F-ino. Maymí           »       » «Ĝerona Espero» el Girona

S-ro. Prat,             »       » «Bela Espero» el Manresa

Pastro Font-Giralt,   »       » «Studenta Juneco» el Girona

S-ro. Valls,            »       » «Esperanta Nesto» el Ripollet

S-ro. Pernas,          »       » «Esperanta Burgono» el Rubí

S-ro. Solà,             »       » «Lumon» el Terrassa

S-ro. Oliver,          »       » «Aplec» el Sabadell

S-ro. Alberich         »       » «Paco kaj Amo» el Barcelona

kaj aliaj.

Eksterlandaj salutoj estas ankaŭ multaj: el amikoj de *K. E. F.*; el abonantoj de *K. E.*; el konkursantoj kaj juĝantoj de la Floraj Ludoj; el laŭdantoj de nia agado en Esperantujo, inter kiuj, kiel ekzemplon ni represas tiun de la «Sudslava Esperantista Ligo», el «Zagreb» (Jugoslavio) 11-an de Majo 1926. Kataluna nacia Esperanto kongreso — Santa Coloma de Farnés. — Al la samideanoj, kiuj pli prudente ol iuj aliaj sciis uzi la veran valoron de Esperanto por montri al la profana mondo la trezorejon de sia koro, do al la filoj de popolo vivanta, vivkapabla kaj nepre trovonta sian belan destinton — ni sendas, okaze de via nacia kongreso, niajn varmajn gratulojn kaj aklamojn».



## XII<sup>aj</sup> Internaciaj Floraj Ludoj

Tiu glora Institucio por la kataluna lingvo kaj por Esperanto, tradicia por la unua kaj ankaŭ por la dua, kiel internacia efektivigata de *K. E. F.* kaj okazigita en la nuna jaro kiel ĉefa solenaĵo de nia Kongreso en Santa Coloma, alvenigis grandan amason en la plej grandan salonon en tiu urbo. Multnombra kaj varia publiko atendis avide pri la majesteco kaj soleco de la Florluda Festo. Je la kvara kaj minutoj posttagmeze aperas sur la estrado la aŭtoritatuloj de la urbo kaj de la Kongreso. La urbestro anoncas la komencon de la Festo de Belego kaj Poezio. Subite emociige, ĉiu silentegas, kaj la Sekretario de la XIIaj. Floraj Ludoj, nia talenta samideano el Terrassa, S-ro Josep Ventura, eklegas majstran raporton pri la nunjara Konkursaro. Jen, do, la

## RAPORTO DE LA SEKRETARIO

## Gesinjoroj!

Kun kia ĝojo kaj feliĉa ekstremo ni venas hodiaŭ al tiu ĉi sanktega nunjara Templo de nia internacia Poezio trinkigi en la varmeta enaero de nia ĉefa jarfesto, nian animon soifantan je amo kaj pureco, el la ĝentila ŝprucilo de niaj poetoj kaj prozistoj! Kun kia fervoro ni ĉeestas tiujn ĉi momentojn de intima ĝuo, de religia sento por nia kara idealo kiu nin kunigas ĉi tien por eltrinki la mielon de la kantoj de niaj zumantaj orabeloj kaj suprenlevigi por momento for de la trenanta mondo en kiu ni travivas! Ho vi, potencaj bardoj kaj ceteraj artistoj de la parolo, per viaj kantoj vi levas nian spiriton al la altaj regionoj de la Beleco kaj Poezio kaj igas nin ricevi ĉielradion meze de l' mallumo de la pasioj kaj malamoj de l' homoj.

Dum tuta jaro vi knedas en via elektita animo la fermenton de novaj konceptadoj, por ilin proponi plej delikate al la esperantista popolo dum la ekflorado de tiu ĉi pompa magnolio de niaj Internaciaj Floraj Ludoj. Kaj vi kantas la vivon tiel dolĉe, kun tia kristala sonoro en nia koro, ke vi nin sorĉas kaj igas nin ami la vivon spite ĉiuj kontraŭaĵoj kaj turmentoj kiuj povus nin, fulmrapide, ĝin abomenigi. Tiajn momentojn, kiel rimarkas fama kataluna poeto, ni volus restigi por eterne en nia koro por ke ili faru nin ĉiufoje pli amindaj kaj bonaj, pli toleremaj kaj respektemaj, pli sinceraj kaj bonfidaj, pli sindonemaj kaj komprenemaj ol ni estas, ke ili farus la miraklon transformi nin en estaĵojn indajn je la teraj gloroj kaj je la ĉiela imperio de Dio. Orfeo malsuprenvenis kun citro el Olimpo por dresi la sovaĝbestojn el la tero: do, la freŝa muziko de viaj liroj, poetoj, tuŝu nian plej profundon dispelante la balaston de niaj malbonaj sentoj, kaj agoj!

La festo de la Floraj Ludoj en nia lando, estis la plej forta bastiono de la kataluna lingvo kaj la plej klara manifestiĝo de ĝia vivpova beletristiko en tiu ora epoko kiam ĉio floris mirinde meze de la reĝaj kortegoj kaj meze de dolĉa nomo kiun nur Libereco povus egaligi. Enkondukita en nian landon de la kataluna reĝo Johano I<sup>a</sup>, alnomita la Amanto de Ĝentileco, fine de la XIV<sup>a</sup> jarcento, kaj greffita el la Oklingva florlda institucio de Toulouse, ĝi atingis sub la patriarka apogo de tiu reĝo nesuspektitan apogon kiu transcendis, dank' al la tiamaj katalunaj trobadoroj, al la eŭropaj reĝpalacoj kie ili aŭdigis siajn geniajn produktaĵojn en nia patra lingvo.

Bedaŭrinde, tiu brilanta epoko de la kataluna elflorado ne daŭris tre longtempe, ĉar je la fino de la XV<sup>a</sup> jarcento oni spertis la unuajn simptomojn de malrapida sed certa dekadenco de la literaturo kaj de ĉiaj artoj, sciencoj kaj metioj, al kiu dekadenco kontribuis plej ĉefe la trobadoroj mem el la lasta tempo kiuj disiris forlasante sian landon en la orfeco de la plej puraj kolonoj de sia literaturo. Sekvis al tio malaltiĝo de la morala nivelo de la popolo kaj ioma elvaporigo de ĝiaj sanaj moroj kaj tradicioj ĝis kiam la Destino finhakis la landon kaj saĝne kun tio la vivsukon de la lingvo kiu restis sveninta en la cindroj de l' forgeso kaj malestimo, preta baldaŭ droni



en la mortospasmoj, se la filoj de la lando, ĝiaj adorintoj, reakirinte konsciencon pri si mem, ne venos ame ĝin eltiri el tia situacio.

Kaj jen: la restarigo de la Floraj Ludoj meze de la pasinta jarcento, estis la komenco de nova epoko por la kataluna lingvo, kiu reviviĝis kun forto, dank' al la patra varmo kaj adoro kiujn oferis al ĝi la novaj trobadoroj kvazaŭ ili estus novaj enamigintaj princoj kiuj almitus la karcerkastelon por malensorĉi tie la principinon de siaj plej dolĉaj amoj. Ili sukcesis per siaj kantoj ekforigi la vestaĉojn de sia Cindrulino kaj surmeti al ŝi la brilantan diademon kaj mirbelan tualeton de princino kiujn majeste ŝi surportas en la nuna tempo.

Se do tia komuniigo inter poetoj kaj popolo, efektivigita de tiaj altaj solenaĵoj, povis tiel efike influi en la renaskiĝo kaj vivpotenco de la lingvo, en ĝia literaturo kaj en la vivo kaj moroj de nia lando, kion do ĝi ne sukcesos atingi por nia kara internacia lingvo Esperanto, se ni daŭrigas okazigante ĉiam pli brile kaj entuziasme ankoraŭ, tiajn spiritaĵajn interluktojn kiuj nin ravas, kaj eĉ ne ĉesas peni ke ili vastiĝu ekster la limojn de la patra teritorio, por ke, fine, la tuta Esperantujo sentu sin flamigita de tiu sama korinklino al idealo de Beleco kaj Poezio kiu en ni fajras! Kian miraklon ne okazigos al nia internacia Cindrulino tiuj ĉi manifestadoj de poetoj kaj prozistoj kiuj konstante dediĉas al ŝi la ravon de siaj geniaj verkoj por enblovi en ŝian artefaritan sed belan korpon la eternan vivoforton kiu ne plu mortas tra la tempoj?

Se nia patra lingvo reviviĝis tiel profunde sub la influo de la Floraj Ludoj, Esperanto, ankaŭ, per ilia starigo kaj regula okazigo, povas plene disvolviĝi kaj triumfi en la fundo de la universala animo.

Oni ne plu diru ke Esperanto ne vivas, ke ĝi ne estas vivpova lingvo. La poetoj kantas kaj vibrigas niajn animojn per siaj ĝojaj kaj malĝojaj sentesprimoj; do, la lingvo vivas kaj ekregas jam mirinde sur la tero.

Se malgranda semo povas produkti arbegon, nia semo, la semo de la Floraj Ludoj kiun ni, katalunoj, ĵetis en la esperantistan mondon, fekundiĝu tra ĝi kaj kreu la jarcentan arbon de nia internacia lingvo. Kiel bele estus, se ĉiu lando, kompreninte la efikon de nia Festo, unu post alia, proprigus al si la spiriton kiu informas ĝin kaj ekstarigus similajn altarojn al la Diino Poezio kiu tiel superabunde regalas la lingvon kaj nin mem! Nia sankta afero antaŭen marŝus kun nesuspektita rapideco kaj ne malfruus la definitiva venko kiun ni arde deziregas ĉar ĉies koroj ekkonsumiĝus en la flamo de ĉio bona, nobla kaj bela, kvazaŭ Dia padonaco por eterne.

Gesinjoroj: Jam estas tempo ke mi proklamu la feliĉan triumfonton en la beletristika turniro kiun ni nunjare organizis.

La poeto favorita de la Muzoj estas la talenta pioniro, S-ro. **Teo Jung** el Horrem bei Köln (Germanujo). Al li la palmo de la gloro kaj la trofeo de la venko!

Li elektis la ĉarman kaj distingindan fraŭlinon **MERCÉ BURCH DE BARRAQUER** el tiu ĉi urbo, por proponi al ŝi la sceptron de Reĝino de la Festo.

Ni sciu riverenci, kiel konvenas, antaŭ Ŝia Moŝto, pruvante ke nia admiro al Ŝi estas senlima kaj ke ni Ŝin akceptas por tia alta posteno kun la pordoj de la koro plenlarĝe malfermitaj.

(En tiu ĉi momento la aŭtoritatuloj iras akcepti la Reĝinon kaj Kortegani-  
nojn ĉe la enirejo de la salono, kaj baldaŭ revenas al la estrado laŭ-  
pare kun ili dum orkestro ludas konvenan muzikajon).

Adorinda Reĝino  
Brilaj Korteganiroj

Mi volus posedi la inspiron de Dante por kanti al vi la ekscelencojn de via nobla korpo kiu elspiras la plej ravajn parfumon kaj ĉarmon, sed mi ne estas tuŝita de la Dia graco, kaj mi nur intencos trovi la ĝustajn esprimojn por eldiri al vi la tutan admiron kiun ni sentas pro Via senfina ĝentileco, kaj la profundan dankon kiun ni ŝuldas pro Via bonvolo akcepti la altan postenon al kiu la liro de poeto vin levis. En Via trono de Reĝino, Vi simboligas la bonecon kaj purecon de la homaj sentoj kunfanditaj en la idealo de Belecio kiu estas pano de vivo. Kaj kvankam via regado estas tro mallonga, ĝi fariĝas, pro tiu lingvo por kiu ni klopodas, la plej vasta kaj la plej dolĉa el ĉiuj regadoj, ĉar ĝi regas la tutan esperantistan mondon kaj ne kreas malamojn kaj malpacojn kiel la ceteraj. Al Vi, do, kara Reĝino kaj indaj Korteganiroj, la homaĝo de respektoplena saluto kaj danko kiun adore proponas al Vi viaj humilaj vasaloj!

Ekscelencaj aŭtoritatuloj  
Distingindaj reprezentantoj  
Sinjorinoj kaj sinjoroj!

Kun granda ĝojo ni povis vidi tiun ĉi jaron la gravan nombron da verkoj alvenintaj por partopreni la diversajn konkursojn de la Floraj Ludoj. Ili atingis la n-on. 140, sed fakte ili estas 144, ĉar du devizoj el la listo, la n-roj. 121 kaj 140, entenas respektive kvar kaj du verkojn, kio pligrandigas la nombron ĝis 144.

Efektive, sufiĉe da ili sin montras tre valoraj verkoj, sub kies riĉa stilo kaj brilantaj pensoj oni divenas la lertan manon de eminentaj verkistoj en nia literaturo.

Oni nur povus iomete riproĉi la trolongecon de la plimulto inter kiu, kelkaj vere atingas rekordon en la historio de niaj Floraj Ludoj. Ŝajnas ke niaj verkistoj baraktas por plilongigi ĉiujare siajn produktaĵojn, kio, se en certaj okazoj estas pruvo de lerteco kaj de pli vastaj konceptadoj de la aŭtoro, en multaj aliaj, estas montrado de malforteco karakterizita de difuzeco de pensoj kiujn anstataŭas superabundeco da vervo. Kaj ne ĉiam la pli longaj verkoj estas la plej bonaj. Oni ĉiam memoru ke koncizeco estas unu el la plej ŝatataj kvalitoj en verkado.

Ĉe la aljuĝo ni povis konstati kun bedaŭro, la malgravecon de la premioj proponitaj, kio malebligis al ni dece premii kelkajn verkojn meritan-

tajn pli grandan kompenson. Malgraŭ tiu cirkonstanco, la verkoj alfluis el 15 malsamaj nacioj, en nombro kaj kvalito vere rimarkindaj.

Tiu nombro estiĝas la plej alta atingita de ĉiuj antaŭaj konkursoj, escepte pri la X-aj Floraj Ludoj kiuj superis la nunajn je unu verko. Kaj pri kvalito, ĉiuj verkoj pli malpli distingigās, pli malpli havas ian valoron, krom kelkaj kiuj vere pekas kontraŭ gramatiko kaj pruvas la heziton kaj mallertecon de novico dezirega kontribui al la plialtigo de la lingvo kaj pliriĉigo de ĝia literaturo. Al ili ĉefe mi rekomendas studi funde la lingvon kaj praktikiĝi en ĝia regado, kaj poste kulturiĝi per legado de grandaj verkoj, por ke, fine, sen malpaciencoj, ili povu fari ion bonan kaj definitivan.

Tre plendinda estas la preskaŭ kompleta manko de partopreno en la ordinara tradukitaj tekstoj, specimenaj floroj de nia enlanda literaturo. Nur du verkoj por la versaĵo kaj sama nombro por la prozaĵo, alvenis, sen signifa kvanto konsiderinte la kompetentajn plumojn kiuj kapablus transdoni al Esperanto la esprimojn kaj stilon el la originalo. Kaj eĉ la versaĵoj, nek laŭ lingva, nek laŭ poezia vidpunktoj sukcesas respuguli la sonoran kaj flugilhavan kreaĵon de nia juna kataluna poeto. Tial, mi instigas la kompetentulojn ne resti brakplektitaj antaŭ tiuj ĉi du konkursoj kiuj formas du ĉefajn kolonojn de niaj Floraj Ludoj. Ili ekpretiĝu estonte kontribui per propra fardo, ke tiaj kolonoj montru la reziston de la ceteraj, tiamaniere ke la ekvilibro konserviĝu en nia konstruaĵo de ordinaraĵoj.

Farinte tiun ĉi ĝeneralan skizon pri la verkoj, alvenas la momento detale raporti pri ili, al kio mi tuj transiras.

## ORDINARAJ TEMOJ

### *Originalaj tekstoj I — Versaĵo kantanta Amon.*

Dek tri versaĵoj aspiris al la premio sed nur sep el ili estas vere rimarkindaj kaj montras kapablon de poeto. Atentinte tiujn ĉi sep verkojn, la Juĝantaro preskaŭ unuanime, kun sola kontraŭa voĉdono, decidis aljuĝi la premion kaj sekve la Naturan Floron al la verko n-ro. 31, devizita «**Amo miraklojn okazigas**» kiu estas longa poemo konsistanta el cent du kvar-versaj strofoj, dividitaj en du partoj, kiuj strofoj rimas ĉe la dua kaj kvara versoj. Krom tio ke iaflanke de la poemo enŝoviĝas preskaŭrimoj en la unua kaj tria versoj, ĝi rimas kaj ritmas perfekte. Ĝi estas granda laboro de la verkinto kiu ne forprenas al ĝi ĉarmon. Ĝi pentras vastan panoramon da scenoj de dolĉeco kaj doloro kiuj allogas ĝis la fino. Ĝia aŭtoro estas S-ro. **Teo Jung** el Horrem bei Köln (Germanujo).

(La poeto, S-ro Jung, alpaŝas sur la scenejon kaj legas sian verkon)

## LA ALTA KANTO DE LA AMO

Alte super la abismo  
Roko kun ruino pendas.  
Raŭkaj korvoj ĉirkaŭgrakas,  
Kaj en fendoj vento plendas.

Antaŭ longe tiun rokon  
Altkastel' fiero kronis;  
Nokte el fenestroj lumaj  
Laŭta festobruo sonis:

En salon', nun rubiĝinta,  
Hejmeninte de ĉasado,  
Kun kunuloj gaje festis  
Brava kavalir' Konrado.

Estis viro li tre forta,  
Tre riskema kaj sen timo;  
Sed sovaĝa en ĝuado  
Kaj en la koler' sen limo.

Tamen, kiel eĉ la feron  
Fandas la puriga flamo,  
Ankaŭ lia kor' moligis  
En la ardo de la amo.

Bel' Krimhildo ŝia nomo  
Kies amon li akiris,  
Kies ĉarm' printempe virga  
Ĉies miron al si tiris.

Pacience provis bona  
Bel' Krimhildo lin mildigi,  
Al pli altaj, noblaj pensoj  
Kaj bonagoj lin instigi.

Sankta tasko de virino!  
Beno estas la sukceso:  
Suna amo kaj feliĉo  
Sen nubeto kaj sen ĉeso...

Venis vok' de Sankta Patro,  
Vok' al Kruca Militiro,  
Kaj ĝin aŭdis tra la landoj  
Ĉiu brava kavaliro.

Ankaŭ kavalir' Konrado  
Zonis glavon, prenis ŝildon,  
Lasis hejmon kaj kunulojn  
Kaj edzinon, Bel' Krimhildon.

Sanktan Landon liberigi  
Rajdis li' por venk' aŭ morto  
Ploris post li Bel-Krimhildo,  
Ĉar malhela estas Sorto.

Sidas ŝi en hejm' soleca,  
Preĝas, ploras kaj laboras.  
Malrapide rampas tempo,  
Atendado tro doloras.

Iam la kastelan pardonon  
Frapis fremda ĵusinjoro,  
Kun la harpo sub la brako —  
Signo de la trobadoro.

Kaj li paŝas al Krimhildo,  
Tuŝas kordojn — dolĉa gamo:  
En sonoraj ondoj fluas  
Alta kanto de la Amo.

Pri feliĉo kaj sufero  
Kantas juna trobadoro,  
Sentoj dolĉaj kaj amaraj,  
Alta ĝoj' kaj mortdoloro.

Kaj ŝi petis, kaj li restis,  
En muziko ŝin instruis,  
Ĝis la kant' de ŝiaj lipoj  
Kiel de la liaj fluus.

Kaj la trobador' foriris.  
Ree ŝi soleca estis;  
Sed la harpo kaj kantado  
Ŝia korkonsolo restis. —

Jam forpasis tuta jaro,  
Sed Konrado ne revenis.  
Plu solecan Bel' Krimhildon  
Hejm' malgaja ne retenis.

Iutage oni vidis  
En la mondon ŝin foriri;  
Sed de ŝia voj' la celon  
Ja neniu povis diri.

Intertempe furiozis  
La milit' en Oriento,  
Akra estis la luktado  
Inter Kruco kaj Krescento. \*)

\*) Krescento = Duonluno.

Brave batis kavaliroj  
Brunajn filojn de l' Profeto.  
Jen la batalvoko: Kristo!  
Jen: Allah' kaj Mahometo!

Ankaŭ kavaliro Konrado  
Kun leona fort' batalis,  
Kaj per lia glav' laŭvice  
Saracenoj kapoj falis.

Tamen kie cento falis,  
Tie releviĝis milo.  
Sen decido la batalo  
Daŭris ĝis la lasta brilo.

Noktmantelo stelbrodita  
Kovris sangan batalkampon,  
Super kiu preterŝovis  
Luno sian palan lampon.

Kiam frumatena suno  
El dezert' levigis ore,  
Staris novaj turkaj vicoj  
Alvenintaj noktahore.

Brave luktis kavaliroj  
Jam denove ĝisvespere.  
Multaj estis mortbatataj  
Aŭ kaptataj malespere.

Ankaŭ kavaliro Konrado  
Estis viva, sed vundita.  
Kvankam li la morton serĉis,  
Li retrovis sin — kaptita.

Kun aliaj sklavigite  
Kaj ligite je kafeno  
Estis li forkondukata  
Por laboroj, peza peno.

Servutante, en ĉifonoj,  
Ili penas kiel sklavo —  
Kiuĵn iam la kiraso  
Kovris kaj ornamis glavoj.

Mute, kun klinitaj kapoj  
Ili fariĝas la laboron,  
Kaj ne sentas vipobatojn  
Nek alian korp doloron.

Kio ilin dolorigas,  
Estas iu prem' anima;  
Ĉar la pensoj ĉiam migras  
Al la hejmo malproksima.

Al la montoj, al la valoj  
En la Frankolando bela,  
Al kunuloj hejmrestintaj,  
Al edzino korfidela.

Iutage — kia sono?  
Kia dolĉa melodio?  
Hejma lingvo — glora kanto!  
Ĉu miraklo? Fantazio?

La palacon de l' sultano  
La kaptitoj ŝtel-aliras  
Kaj aŭskultas spirretene  
Kaj rigardas, forte miras:

Antaŭ la sultanon paron  
Paŝis knab' gracia, bela,  
Kantas pri la Frankolando,  
Kantas ĝin kun voĉ' angela;

Kantas ĝin kun varma koro,  
Kun rideto ĉirkaŭbuŝe,  
Akompane sonigante  
Kordojn delikatatuŝe. —

Kant' finiĝis. Emocie  
Sidas la sultana paro,  
Emocie ankaŭ staras  
En la korto la sklavaro.

Larmo brilas en okulo  
De la bela sultanino,  
Puran perlon ŝi malligas  
El ĉenet' sur sia sino.

Ĝin ĵetante al la knabo,  
Montras ŝi favorrideton.  
Kaj li riverencas danke,  
Sentetante ŝian peton:

Paŝas paŝon pli proksimen,  
Reekludas — dolĉa gamo:  
En sonoraj ondoj fluas  
Alta kanto de la Amo.

Pri feliĉo kaj sufero  
Kantas knabo — trobadoro,  
Sentoj dolĉaj kaj amaraj,  
Alta ĝoj' kaj mortdoloro.

Kiam li pri ĝojo kantas,  
Estas, kvazaŭ sun' aperas:  
Montoj brilas oraveste,  
Sonaj ondoj tremfajreras.

Sed dum li suferon pentras,  
Nigra nokto sin etendas;  
El senlumaj abismegoj  
Mil animoj plore plendas. —

Kaj denove kant' finiĝis.  
Ĉio reŝtas mirsilente.  
Sultanino nur singultas,  
Larmino falas ĵam forente.

Kaj sultano Saladino  
De la alta trono paŝas;  
«Knabo», diras li, «miraklan  
Sorĉon via voĉo kaŝas.

Puran perlon mia kara  
Beledzino al vi ĵetis;  
Sed de mi, tuŝita same,  
Vi ne ĵam favoron petis!» —

«Ho, se vi la rajton donas —  
Via estas ja la forto;  
Liberigu tiujn sklavojn,  
Jen starantajn en la korto!

Samlandanoj ili estas;  
Kaj vidante sortobaton,  
Kiu akre ilin trafis,  
Sentas mia kor' kompaton!» —

«Multon, knabo vi postulas,  
Kvankam ne por vi persone;  
Sed promeso estu firma,  
Ne ŝangebla laŭbezone!

Baldaŭ viajn samlandanojn  
Hejmen portu vel' kaj masto!  
Sed vi, knab', ankoraŭ restos  
Kelkatempe mia gastoj!

Via harmonia ludo.  
Viaj kantoj melodiaj  
Estos artoplena ĝuo  
Por soifaj sentoj miaj!

Sciu, altvalorojn tenas  
Mia trezorejo kara;  
Kontraŭ vera arto ĉiam  
Mi min montris malavara!

Poste, ĝis la landa limo,  
Sur rapidaj ras-ĉevaloj  
Vin kondukos tutsekure  
Kavalkado da vasaloj!» —

Ĝoj' ekbrilis en okulo  
De la knabo — trobadoro,  
Kaj profunda klin' esprimis  
Lian dankon pro l' favoro.

Same ĝojis la kaptitoj,  
Kies koroj preskaŭ krevis;  
Libereco! Jam ĝi venos,  
Kiun longe ili revis.

Kio ilin dolorigis;  
For terura pren' animaj!  
Baldaŭ ili ja revenos  
Al la hejmo malproksima!

Al la montoj, al la valoj  
En la Frankolando bela  
Al kunuloj hejmrrestintaj,  
Al edzino korfidela.

## II

Kavalir' Aŭtuno spronis  
Sian grizan ventĉevalon —  
Kie ĝiaj hufoj frapas,  
Ĝi ellogas la fatalon.

Velkas vivo, flavas floroj,  
Kaj malgaja melodio  
Tra la nudaj branĉoj flustras,  
Tremas lasta nur folio. —

Kaj alian kavaliron  
Vidas landon mi trapaŝi;  
Sen ĉevalo, malfiere,  
Kvazaŭ li sin volus kaŝi.

Ne kiras' juvelradia  
Lian bruston plu protektas;  
Nur ĉifonoj... Jam neniu  
Kavaliro lin konjektas.

Lace penas li, sin trenas  
Dum la longa voj' surstrata.  
Unu penso nur; Antaŭen  
Al la hejmo sopirata!

Ĉion li feliĉe venkis;  
La atakon de l' korsaroj,  
Uraganon, ŝiprompiĝon,  
Eraradon sur la maroj!

Kie la kunuloj vagas?  
Ĉu pereis, hejmenvenis?  
Li ne scias. Ĝis ĉi tie  
Sola li sin pene trenis.

Sorto ilin disblovadis  
Kiel vento en aŭtuno,  
Li nur — lasta folieto —  
Alkroĉiĝis al Fortuno.

Baldaŭ celon atingonte,  
Nun li ne plu iri povas.  
Staras gastodom' ĉevojeto —  
Tie li ripozon trovas. —

Mastro metas dolĉan moston; \*)  
«Kien, kaj el kiu lando?» —  
La migranto en ĉifonoj  
Ne respondas je l' demando.

Sed preninte fortan gluton,  
Mem al mastro li parolas:  
«Kiel tie ĉi aferoj  
Statas, ĉu vi diri volas?» —

Kaj la mastro tro inkline  
Pri kastelo ekrakontas,  
Ke perfida sinjorino  
Eĉ adulti jam ne hontas.

«Brava edzo militiris  
Kaj ŝin devis lasi sola.  
Venis juna bela viro —  
Kun parolo tente — mola.

Longe restis la fremdulo,  
Tamen fine sin retiris.  
Ankaŭ ĉasta Bel' Krimhildo  
Iutage monden iris.

Longe staris la kastelo  
Tutsuleca, forlasita,  
Ĉar nur antaŭ kelka tempo  
Ŝi revenis riĉdotita.» —

«Vi mensogas!» kriis gasto,  
«Vian langon gardu, bubo!» —  
«Ŝajne vi pli bone scias,  
Mokas mastro, «ja sen dubo!» —

Sur la seĝon gasto falas,  
Kaptas lin sovaĝa spito.  
Poste li longtempe sidas  
Silentante en medito.

Sed subite li eksaltas  
— Most' verŝiĝas, seĝo krakas —,  
Kaj senlima furiozo  
Kaj kolero lin atakas.

Jam li estas eksterdome.  
Mastro sentas fortan miron;  
Ne ekkonis en la gasto  
Revenintan kavaliron.

En salono ĉe fenestro  
Bel' Krimhildo jen enpense!  
Vento la muregojn skuas,  
Nub' peliĝas nigre — dense.

Dolĉe — duba antaŭĝojo  
Laŭtfrapigas ŝian koron.  
Kiomfoje ŝi travivis  
Reve la revidan horon!

Nun ĝi estas jam proksima,  
Baldaŭ la amato venos  
Kaj fidelan la edzinon  
Amoplene ĉirkaŭprenos. —

Pord' puŝiĝas. Enpenetras  
Homfigur' teruraspekta  
Kaj sin ĵetas sovaĝege  
Al virino sensuspekta.

«Jen vi havu vian punon,  
Vi serpento malfidelal!» —  
Kaj en lia man' ekfulmas  
Jam ponardo koroncela.

Mortpaliĝas Bel' Krimhildo  
Pro sensenca la insulto:  
Ĉu li volas — nekredeble! —  
Ŝin akuzi pri adulto?

Sed vidante, ke aŭskulton  
Por defendo ŝi ne trovas  
— Ĉar li staras vengoprete —,  
Ŝi nur tempon gajni provas:

«Se ja morton mi meritas,  
Mi ne mortu sen preparo:  
Unu preĝon nur konsentu  
Antaŭ sankta la altaro!» —

\*) Mosto estas nova bersuko (dolĉa vino).

«Unu preĝon — sed rapide!» —  
Jam salonon ŝi forlasis.  
Kavalir' Konrad' atendis —  
Ne rapide tempo pasis.

Ĉar tro longe daŭras preĝo,  
En koler' la kavaliro  
Kuras al la kapeleto.  
Sed jen — lin haltigas miro:

Jam ne trovas li Krimhildon,  
Sed la knabon, kies kanto  
Pordojn de Liber' malfermis  
Al la jam malesperanto.

Kaj la knabo harpon prenas,  
Kordojn tuŝas — dolĉa gamo:  
Ekaŭdiĝas jam konata  
*Alta kanto de la Amo.*

Pri feliĉo kaj sufero  
Kantas knabo — trobadoro,  
Sentoj dolĉaj kaj amaraj,  
Alta ĝoj' kaj mortdoloro.

Kavalir' Konrado staras —  
Rigidiĝis la rigardo.  
Lia mano malleviĝas,  
Teren falas la ponardo.

Nun en knabo — trobadoro  
La edzinon li ekkonas.  
Surgenuen li sin jetas:  
«Sankta vi, ĉu vi pardonas?» —

Kaj ŝi levis lian kapon  
Kaj pro emocio tremas  
Kaj sur lian kulpan frunton  
La pardonokison premas.

Majo sternis flortapiŝojn  
Sur la belan Frankan teron.  
El kampar' alaŭdoj trile  
Levas sin en bluaeron.

Oraj sunradioj plektas  
Varman ĝojon tra la lando,  
Per agrabla tuŝ' karesas  
Junan paron sur verando.

Man' en mano, kor' ĉe koro —  
Jen Konrad' kaj Bel' Krimhildo,  
Rigardante malproksimen  
Al la rave sorĉa bildo.

Ĉie la Printempo ridas.  
Admirinda panoramo!  
Tuta la natur' rekantas  
*Altan kanton de la Amo.*

Kaj infana ĝojo trilas,  
La kastelon rejunigas:  
Knaboj du kaj knabineto  
Amon eĉ pli firme ligas.

Longe vivis Konrad' idoĵ  
En feliĉo kaj en gloro.  
Brava gento ili estis:  
Ja sen tim', sed ne sen koro.

Tamen, kiel ĉio tera,  
Fine ankaŭ ili ĉesis;  
Sed ilian nomon oni  
Ĝis hodiaŭ ne forĝesis.

Ruinaĵo nun funebras,  
Kie altkastelo tronis,  
Kaj la raŭkaj korvoĵo grakas,  
Kie iam festoj sonis.

Sidis inter la ruinoj  
Mi, aŭskultis korvan grakon;  
Metis, laca de migrado,  
Pezan kapon sur la brakon.

Kaj en sonĝo reviviĝis  
Amokanto melodias...  
Kion ĝi al mi inspiris —  
Jen la frukto poezial!

Unuan honoran mencion oni aljuĝas al la verko n-ro. 1, devizo «Vivanta strofo», lirika poemo, brile verkita, tamen montras ĉe strofo du ritmajn makuletojn. Aŭtoro: S-ro **Jaume Grau Casas**.

Meritas duan mencion la verko n-ro. 3, kun devizo «I aquellas gracies en son rostre juntas, cerco disperses per tants rostres d'altres!» kolekto de kvin versaĵoj tre bonstilaj kaj sufiĉe inspiritaj kiun ni ŝuldas ankaŭ al la facila liro de S-ro. **Jaume Grau Casas**.



Estas aljuĝita tria mencio al la verko n-ro. 39 kun devizo «Cyrano», ampasia soneto, kies aŭtoro estas S-ro. **Cuvi Lovostan** el Budapest (Hungarujo).

Kvaran mencion ni aljuĝas al la verko n-ro. 2, devizita «Un sonnet sans défaut vaut seul un long poème...» soneta triptiko plezurige kantanta tri aspektojn de amsento. Aŭtoro: S-ro. **Jaume Grau Casas**.

Al la verko n-ro. 4, kun devizo «Manta gens me mal razona...» oni aljuĝas kvinan mencion. Ĝi estas amsopira versaĵo ne ĉiam inspirplena, kies sesversaj strofoj egale rimas. Ĝia aŭtoro estas ankaŭ S-ro. **Jaume Grau Casas**.

Ricevas sesan kaj lastan mencion la verko n-ro. 136, devizo «Qu'ieu am la plus de bon aire...» ankoraŭ amkanto produktita de S-ro. **Jaume Grau Casas**.

#### *Originalaj tekstoj II — Ama verko en prozo.*

Ok verkoj konkursis tiun ĉi temon, sed el ili, du vere povus atingi la premion; sed ĉar tiu kun n-ro. 45, kun devizo «Ereto» malgraŭ sia plimallongeco, komunikas pli da emocio, oni aljuĝas al ĝi tiun premion. Ĝia aŭtoro estas S-ro. **E. Aisberg** el Parizo (Francujo).

Sekvas en merito la verko n-ro. 121, devizita «Paŝo post paŝo» kaj titolita «En la mondon...» kiu montras pli fluan kaj perfektan stilmanieron de la verkinto, sed kies fundo, malgraŭ ĝia longeco, ne tiel forte impresas kiel la antaŭa. Al la aŭtoro de tiu prozbrilanta verko, kiu rezultas esti S-ro. **P. Stojan** el Genève, oni aljuĝas la unuan honoran mencion.

Dua mencio estas aljuĝita al la verko n-ro. 76, surportanta la devizon «Papilia ludo» kiu delikate priskribas freŝajn amscenojn inter floroj. Aŭtoro F-ino. **Hilde Scholze** el Reichenberg (Ĉeĥoslovakujo).

Trian mencion meritas la verko n-ro. 82, devizo «Seniĝi estas ĝui», ama noveleto tre bone disvolvita de F-ino **Helena Hempel** el Lwow (Polujo).

Kiel kvaran mencion ni elektis la verkon n-ro. 115, kun devizo «Ĉu amo devigas...?» agrabla rakonto bonstile verkita de S-ro. **H. J. Hoen** el Köln (Germanujo).

Atingas kvinan mencion la verko n-ro. 9, devizita «Paco, Amo kaj Esperanto» kies aŭtoro estas S-ro. **Narciso Bofill** el Palma de Mallorca.

#### *Tradukitaj Tekstoj I — Traduko de la kataluna versaĵo «Les noces de l'Alosa i el Llessamí».*

Kiel dirite, neniu verko meritas la premion. Oni decidis menciĝi en unua vico la verkon n-ro. 8 devizo «Zamenhof» kiu sekvas ritmon sed ne rimon. Aŭtoro: S-ro. **Narciso Bofill**.

Duavice atingas mencion la verko n-ro. 62, devizita «Kompreno estas voĵduono» kiu sekvas rimon sed malatentas pri ritmo. Cetere enmontriĝas

gramatikaj makuletoj implikitaj de postulo ĉe la verskonstruo. Aŭtoro: Pastro **Josep Casanovas** el Girona.

*Tradukitaj Tekstoj II.* — *Traduko de la kataluna prozaĵo «Caminar amb la lluna».*

Unu verko meritas sendiskute la premion: ĝi estas tiu kun n-ro. 117, devizo «The moon» tre ĝusta kaj flustila traduko farita de la lerta plumo de S-ro. **Marian Solà** el Terrassa.

Mencion ni aljuĝas al la alia verko n-ro. 123, sub devizo «Lunhela nokto» sufiĉe bona traduko kiu tamen en kelkaj okazoj ne sukcesas trafi la ĝustan ideon de la originalo. Aŭtoro: S-ro. **Jaume Herp** el Barcelona.

## EKSTERORDINARAJ TEMOJ

### I. — *Interna ideo de Esperanto. Premio de la Komitato de K. E. F.*

Sep verkojn ni kolektis por konkursi tiun ĉi interesan temon. Preskaŭ ĉiuj enhavas rimarkindajn kvalitojn pro la ideoj elmontritaj pri la afero, kiun ili pritraktas laŭ malsama vidpunkto.

Reliefiĝas pro sia konceptado pri la temo, la verko n-ro. 67, sub devizo «Ne faru frazojn pri la vivo, sed penu ekkoni ĝin» al kiu estas aljuĝata la premio. Ĝin verkis D-ro. **Emmanuel Olsvanger** el London (Anglujo).

Oni kreas kvar menciojn kiujn oni aljuĝas laŭ jena ordo:

Unua mencio al la verko n-ro. 138, devizita «La Verko de l' Majstro» kiu celas difinon de la temo pere de tre bonstila rakonto. Ĝia aŭtoro estas S-ro. **Otto Wehlitz** el Rahnitz - Hellerau (Germanujo).

Dua mencio al la verko n-ro. 66 kun devizo «Per Esperanto al Dio» fragmento de parolado verkita de S-ro. **Leopold Berger** el Moravany (Ĉeĥoslovakujo)

Tria mencio al la verko n-ro. 11 surhavanta la devizon «Kion oni volas tion oni povas» serio da komentarioj pri kongresparoladoj de D-ro. Zamenhof rilate la aferon kaj rilate homaranismon. Aŭtoro: S-ro. **Boucon** el Anancy (Francujo).

Kvara mencio al la verko n-ro. 101, devizo «Kave» kiu glosas la temon en flua lingvaĵo. Aŭtoro: S-ro. **Jakobo Schmid** el Bern (Svisujo).

### II. — *Fideleco al la Fundamento de Esperanto. Premio de la Redakcio de «Kataluna Esperantisto»*

Kun ĝojo ni devas rimarkigi, ke el la du verkoj ricevitaj por tiu ĉi konkurso, unu, tiu kun n-ro. 140, kaj devizo «Unueco donas forton!» meritas tre specialan atenton ĉar ĝi estas tre dokumentita monografio, 82 paĝa, detale kaj funde studanta nian Fundamenton kaj la historion de la lingvo ĝis la okazigo de la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne

sur Mer, kiam nia Fundamento ricevis plenan oficialigon kontraŭ la surdaj atakoj de certaj tiamaj famavidaj papoj de nia movado kiu tion kontraŭstaris por povi efektivigi propramove sinsekvon da reformoj en nian lingvon. La verko dividiĝas en dek du ĉapitroj kaj kvar aldonoj, korekte verkitaj, kiuj vekas grandan intereson. Krom tio, la verko kunigas mallongigitan skizon pri la sama temo, en formo de demandoj kaj respondoj, kiu bone solvas la temon proponitan. Pro ĉio-ĉi la Juĝantaro senhezite aljuĝas al ĝi la premion kaj solene deklaras ke ĝi estas efektive inda je pli alta distingo neebila en la nunaj Floraj Ludoj. Estas ĝia aŭtoro: S-ro. **Andreo Petroviĉ Andrejev** el Tiflis Kaŭkazo (Rusujo)

Menciinda sin montras la alia verko n-ro. 129, devizita «Nomina sunt odiosa» kiu faras bonan defendon pri la netuŝebleco de nia Fundamento, kaj kies aŭtoro estas S-ro. **Jakobo Ŝapiro** el Bialystok (Polujo).

### III. — Tradukitaj versaĵoj (I.<sup>a</sup> grupo) — Premio de S-ro. Narciso Bofill.

Konsistigas tiun ĉi grupon sep verkoj, post kies analizo oni decidas premii la n-ron 5, devizo «Sonetoj kaj madrigaloj», kolekto da kvin sonetoj kaj du madrigaloj el la ora jarcento hispana majstre tradukitaj de nia talenta poeto S-ro. **Jaume Grau Casas**.

Atingas unuan mencion la verko n-ro. 121, devizo «Paŝo post paŝo» titolita «La nubeto» delikata traduko el la rusa lingvo ŝuldita al la lerteco de S-ro. **P. Stojan**.

Duan mencion oni aljuĝas al la verko n-ro. 59, devizo «Laboru senĉese, ne zorgu pri fin', la tombo atendas ne verkon sed vin», aro da kvin versaĵoj el la latinidaj lingvoj kiun tre bone tradukis nia multfoja laŭreato S-ro. **Jaume Grau Casas**.

Oni liveras trian mencion al la aŭtoro de la verko n-ro. 119, sub devizo «Dies irae dies illa...» por lia traduko de dek naŭ triversaj kantstrofoj, ĉiu samrime, eltiritaj el la *Sequentia Misae Defunctorum*. Li estas S-ro. **Pere Bayona Roca** el Girona.

### IV. — Originalaj versaĵoj — Originalaj sciencaj verkoj. Premio de S-ro. Miquel Argemí.

Tiu ĉi premio estas duonigita inter la du esprimitaj temoj kiuj formas du grupojn da verkoj.

## ORIGINALAJ VERSAĴOJ

Dek ok verkojn ni envicigis en tiun ĉi grupon, kaj malgraŭ ĝia alta nombro, tre malmultaj estas la verkoj kiuj havas verajn kvalitojn por ricevi la premion. Traesplorinte kun atento ilian apartan valoron ni konkludis ke la verko n-ro. 14, devizita «Pax Tibi, Merce, Evangelista meus» meritas tiun premion kaj al ĝi ni ĝin aljuĝis. Ĝi estas kristana poemo, verkita en la pompo de la klasikaj dekunusilabaj versoj kaj enkadrita en kvar kantoj ĉiu

mezuranta cent versojn. Vera pruvo de la potenca Muzo de S-ro. **Francesco Pizzi** el Venezia (Italujo).

Unuan mencion oni aljuĝas al la verko n-ro. 92, devizo «Belaĵo estas ĝojo por ĉiu» flua versaĵo verkita de S-ro. **Jan van Schoor** el Antverpeno (Belgujo).

Atingas duan mencion la verko n-ro. 41, devizita «Blankaj birdetoj» pro ĝia stilo kaj kadenco. Aŭtoro: S-ro **Teo Jung**.

Estas inda je merito por la tria mencio la verko n-ro. 63 sub devizo «Mi faris mian aferon kaj atentos ceteron» Aŭtoro: F-ino. **Catharina J. Roskes** - Dirksen el Hago (Nederlandoj)

Ricevas kvaran mencion la verko n-ro. 121, devizo «Paŝo post paŝo», titolita «Dimauĉe» kiun sendis S-ro. **P. Stojan**.

Al la verko. n-ro. 34, distingiganta per la devizo «Ni proponas, vi disponas» oni aljuĝas kvinan mencion. Aŭtoro F-no **Catharina J. Roskes** — Dirksen.

Estas aljuĝita sesa kaj lasta mencio al la verko n-ro. 132, kies devizo estas «Sub la sankta signo» sendita de S-ro. **Veniamin Vozdvijenskij** el Odessa (Rusujo).

## ORIGINALAJ SCIENCAJ VERKOJ.

Por tiu ĉi temo ni grupigis tri verkojn kaj aljuĝis la premion al tiu kun n-ro. 33 kaj devizo «Mi diris, penu, hom' kaj firme fidu!» ĉar ĝi estas vasta traktato pri naturfilozofio, kiu pruvas profundan konon de la aŭtoro pri tiu scienco. Verkinto: S-ro. **Joseph Major** el Parizo (Francujo).

Por la unua mencio ni elektis la verkon n-ro. 48, sub devizo «Serĉante ni lernos» kiu studas la fontojn de agado de la Universo en formo tre preciza. Ĝia aŭtoro estas: S-ro. **Sydney J. Smith** el London (Anglujo).

Al la alia verko n-ro. 106, kun devizo «Miraklo» ni aljuĝas la duan mencion. Flustila verko faranta tre interesan defendon de miraklo laŭ sciencia vidpunkto. Ĝin verkis: S-ro. **Jakobo Schmid** el Bern (Svisujo).

### V. — *Temo rilatanta al U. E. A. Premio de tiu Asocio.*

Ni ricevis por la dirita temo tri verkojn, sed ĉar neniu el ili kolektas sufiĉajn kvalitojn en ĝia pritrakto, laŭ iniciato de la proponinto oni rifuzas aljuĝi la premion.

### VI. — *Originalaj teatraĵoj — Premio de la grupo «Barcelona Stelo»*

Du verkoj interluktis por la atingo de la premio, kaj ĝin gajnas la verko n-ro. 38, devizita «Procede et semper — Italia — semper!» kiu estas amuza teatraĵo bonstile verkita de S-ro. **Arturo Ghez** el Trieste (Italujo).

VII. — *Tradukitaj prozaĵoj (1.<sup>a</sup> grupo) — Premio de D-ro. Sekretulo.*

Estas rimarkinda la nombro da tradukitaj prozaĵoj ricevitaĵoj por la konkurso. Por faciligi ilian plibonon elekton kaj premion ni ilin disdividis laŭ tri grupoj.

El la kvar verkoj entenataj en tiu ĉi grupo, tri montriĝas kun sama kvanto da meritoj; tial ni decidis trionigi la premion kaj ĝin aljuĝi al la jenaj verkoj:

Al n-ro. 50, devizita «La vivo ne estas plej valora posedaĵo...» traduko el la germana lingvo bele ĉizita de F-no **Ella Graszau** el Woldshūt (Germanujo).

Al n-ro. 93, devizo «Tradukoj estas kiel virinoj», valora traduko el la flandra lingvo ŝuldita al la plumo de S-ro. **Jan van Schoor** el Antverpeno (Belgujo)

Al n-ro. 98, sub devizo kaj titolo «La sinjorino kun la skarлата masko» interesa rakonto ĝuste tradukita de S-ro. Profesoro **Adolf Hainschegg** el Graz (Aŭstrujo).

Al la verko n-ro. 40 kun devizo «Mitologio» oni aljuĝas mension pro ĝia korekteco kaj agrabla enhavo. Tradukinto: S-ro. **Edward Wiesenfeld** el Varsovio (Polujo).

VIII. — *Versaĵo aŭ prozaĵo plej bone kantanta la naciajn glorojn — Premio de Eskcelenca Urbeŝtaro de Sta. Coloma de Farnés.*

La temo proponita ne tre altiris la atenton de niaj verkistoj, ĉar nur du verkoj estas ricevitaĵoj. El ili, tiu kun n-ro. 80, devizita «Aglo blanka» kvankam ne tre ampleksa en detaloj, montras certajn kondiĉojn por ricevi la premion. Tion opiniinte, la Juĝantaro ĝin aljuĝis al tiu verko kies aŭtoro estas F-ino **Helena Hempel** el Lwow (Polujo).

Mencion meritas tiu kun n-ro. 113, devizo «Homo devas pensi ne nur pri siaj rajtoj sed ankaŭ pri siaj devoj», kiu, se iel apartiĝas el la temo, tamen estas bonstila kaj interese verkita de S-ro. **Léon Agourtime** el Parizo (Francujo).

IX. — *Temo patrujama. — Premio de S-ro. Ramon Masgrau.*

Kvin verkoj kolektiĝas sub la arkaĵo de la dirita temo. Tuj reliefiĝas el ili, pro sia majstra priskribo de la vivo kaj agoj de landa heroo, tiu kun n-ro. 29, portanta la devizon «Modesta batalanto por rajto kaj honoro» Aŭtoro: S-ro. **Ivan H. Krestanoff** el Pirdop (Bulgarujo).

Oni distingas per unua mencio la verkon n-ro. 22, devizo «Amu vian patrujon» kiu tre koncize pritraktas la demandon. Aŭtoro: S-ro. **Erich Wagenbreth** el Elze — Hannover (Germanujo).

Duan mension atingas la verko n-ro. 130, kun devizo «El ĉiuj floroj, la

abel' alportas ion al la ĉel'» du versaĵoj pri patrujamo el la rusa lingvo tradukitaj de S-ro. **Veniamin Vozdvjenskij**.

X. — *La malmoraleco ĉe la virina vesto* — Premio de S-ro Paroĥestro de Sta. Coloma de Farnés.

Tri verkoj aspiris al la premio, sed nepre ĝin meritas kaj al ĝi estas aljuĝita, la verko n-ro 36, sub devizo «Honny soit qui mal y pense» kiu disvolvas la temon en tre facila kaj originala formo.. Verkinto: S-ino **Emma L. Osmond** el London (Anglujo).

Estas aljuĝita mencio al la verko n-ro. 128, devizo «Dofof» kies enhavo estas korekta diatribo pri la temo. Aŭtoro: F-ino **Anna Kühn** el Dresden (Germanujo).

XI. — XII. — XIII. — *Originalaj prozaĵoj (1.<sup>a</sup> grupo)*.

Tiu ĉi grupo envicigas ses verkojn. Post detala esplorado pri ilia valoro, la Juĝantaro opinias ke tri el ili estas premiindaj kaj preskaŭ samvaloraj. Sekve ĝi destinis al ili la tri aluditajn premiojn kiujn ĝi aljuĝis jenmaniere:

Al la verko n-ro. 61, devizita «Zuiderzee» kiu estas bele priskribita rakonto, la premion XI de la ĵurnalo «La Veu de la Selva». Aŭtoro: S-ro. **J Kramer** el Enkhuizen (Nederlando).

Al la verko n-ro. 108, kun devizo «Rapidu» la premion VII de la firmo «Grafikaj Artoj» ĉar ĝi posedas agrablan allogon. Ĝin verkis la kapabla plumo de S-ro **Jakobo Schmid** el Bern.

Al la verko n-ro. 72, devizo «Bone tiu sidas al kiu la sorto ridas» bona rakonto kun eleganta stilo, la premion XIII de «Granda Hotelo». La aŭtoro estas S-ro. **Ivan Ŝirjaev** el Baklanka (Rusujo).

XIV — *Tradukitaj versaĵoj (2.<sup>a</sup> grupo)* — Premio de «Centra Hotelo».

El la kvar verkoj enhavataj en la nuna grupo akiras nediskuteblan reliefon la du verkoj n-roj. 69 kaj 77, kiuj, kvankam ne sekvas metrikon nek rimon, sed nur la ritmon de la pola originalo el kiu ili estas tradukitaj, transdonas en tre bona lingvo la potencon inspiron de l' enhavo kies legado faras kortuŝan impreson. Tamen, ne povante premii ambaŭ verkojn, la Juĝantaro pesis ilian apartan valoron kaj inkliniĝis ĝia prefero por la verko n-ro. 69, ampleksa apologio pri la vivo, kies devizo estas «Kaj tamen... nia fina celo estas ja — la Morto!» Rezultas aŭtoro de tiu verko: S-ro. **Edward Wiesenfeld** el Varsovio. (Polujo).

Ni aljuĝas unuan mencion al la alia verko n-ro 77, kies argumento montras alkroĉiĝon al la vivo kaj bedaŭron pri la morto, en maniero ke ĝi kaŭzas fortan emocion. Ĝin tradukis per tiu delikata peniko kiun li scias dismovi, la sama S-ro. **Edward Wiesenfeld**.

Dua mencio estas liverata al S-ro. **Veniamin Vozdvjenskij** por lia verko n-ro. 131, sub devizo «Popoloj devas fariĝi al centro celantaj eroj...» poemo el la rusa lingvo, kies fluan tradukon iom makuletas la enekzisto de sufiksaj kaj asonancaj rimoj.

Restas bedaŭrinde nekonkursitaj la temoj XV kaj XVI de Pastro **Josep Puig** kaj de Banloko «Orión» respektive.

XVII. — *Tradukitaj teatraĵoj — Premio de D-ro. Manuel Burch.*

Kvar verkoj interdisputis la premion sed nur du havas la rajton ĝin posedi pro la diskonigo de grandaj produktaĵoj el la eksterlanda literaturo kiun ili faras. Inter tiuj du estas nedubeble ke meritas la trofeon kaj ĝin oni donas al ĝi, la verko n-ro. 94, devizita «Por la XX.<sup>a</sup>» triakta teatraĵo el la flandra lingvo majstre tradukita de la forta kapablo de S-ro. **Jan van Schoor** el Antverpeno (Belgujo).

Sekvas en merito la verko n-ro. 86, devizo «Ĉiam antaŭe kaj antaŭen» liberversa traduko el la kvinakta komedio de la fama Molière, «La Mizantropo» kiu ne tute respondas al la vigla stilo de la originalo pro manko de fleksebleco kiu ĝin rigidigas, sed tamen donas bonan ideon pri ĝia argumento. Verkinto: S-ro. **Boucon el Annecy** (Francujo).

XVIII. — *Plej bona traduko de versaĵo de la fama kataluna poeto Joan Maragall. — Premio de S-ro. Josep M.<sup>a</sup> Iglesias.*

La sola verko ricevita por la dirita temo ne tute sukcesas transdoni la subtilecon kaj ĉarmon de la originalo kiu estas la kvina kanto el la poemo «Hajdé» de nia senmorta poeto. Cetere la ritmo ofte implikiĝas kio faras ne tre agrablan impreson. Tamen ĉar la verko, kiu estas la n-ro. 58, kun devizo «Amb la llum del teu mirar has omplert la meva vida» donas ideon pri la kataluna teksto, ni aljuĝas al ĝi la premion difinitan por tiu temo. Estas ĝia aŭtoro: S-ro. **Jaume Grau Casas**.

XIX. — *Muzikverkado kaj ĥorkreado de la el la pasinta XIX.<sup>a</sup> jarcento kataluna muzikverkisto Clavé — Premio de Hora Societo.*

Neniu verko alvenis por tiu ĉi temo kaj la proponinto bonvolis konsenti ke la Juĝantaro havigu la premion al la verko de temo pli simila. Esplorinte tiun fakton, ni opinias ke la verko n-ro. 114, devizita «Ĉu la muziko efektive malkaŝas nian animon?» pli proksimiĝas al la dezirita temo. Ĝi estas perfekta traduko el la rusa lingvo, kiu, kompreneble, ne glosas la verkon de Clavé, sed fantazie kaj agrable rakontas pri la origino de du muzikinstrumentoj kaj pri la kontraŭaj sentoj kiujn ĉiu el ili elvokas per ludado. Al ĝi, do, la Juĝantaro cedas tiun premion. Rezultas ke ĝia aŭtoro estas: S-ro. **Edward Wiesenfeld** el Varsovio (Polujo).

XX — XXI. — *Originalaj prozaĵoj (2<sup>a</sup> grupo).*

Ni grupigis por tiu ĉi temo kvar verkojn. Du el ili estas tre valoraj kaj montras la puran stilon de plenmatura verkisto. Cetere ilia alloga fundo priskribas riĉmaniere originalajn situaciojn kiuj vere impresas. Pro tio ni aljuĝas al ili la du aluditajn premiojn, tiamaniere:

Al la verko n-ro. 70, devizo «Kio en la koro sidas la vizaĝo perfidas» la XX de S-ro. *Josep Callis*. Aŭtoro. S-ro. **Ivan Ŝirjaev** el Baklanka (Rusujo).

Al la verko n-ro. 71, devizo «Plej granda potenco kuŝas en la komenco» la XXI de S-ro. *Josep Corominas*. Aŭtoro: la sama talenta verkisto S-ro. **Ivan Ŝirjaev**.

Ni distingas per unua mencio la verkon n-ro. 83, kun devizo «Polvo kaj ombro ni estas» tre bona rakonteto sendita de F-ino **Helena Hempel** el Lwow (Polujo).

Duan mencion ni donas al la verko n-ro. 49 sub devizo «Tagiĝas en la mondo» iel difuza sed bonstila verkita prozaĵo kies aŭtoro estas S-ro. **Hector Vermuyten** el Antverpeno (Belgujo).

XXII. — *Katolikaj verkoj. — Premio de S-ro. Joan Ventosa i Calvell.*

Estas vera ĝojo povi grupigi sub la dirita epigrafo tri grandajn verkojn pri katolikismo kiuj venis partopreni kaj honorigi nian konkurson. Ĉiuj ili meritas gravajn distingojn, kiujn pro la diritaj pli antaŭe kaŭzoj, ni ne povas fari al ĉiuj. Ni trastudis ilian meriton kaj venis al la konkludo ke du el ili, originalaj, estas preskaŭ egalvaloraj; sekve, ni duonigis la premion kaj ĝin aljuĝis al ili. La premiitaj verkoj estas la n-ro. 107, devizo «Historio» kaj n-ro. 103, devizo «Laboremo» ŝulditaj al la kompetenta mano de S-ro. **Jakobo Schmid** el Bern (Svisujo).

Al la alia verko n-ro. 104, devizo «Kredo» ni havigas mencion. Ĝi estas bela specimeno de peco el la Katekismo de la Katolika Eklezio, kiun plene kaj sukcese tradukis la sama kapabla verkisto S-ro. **Jakobo Schmid**.

XXIII. — *Pri paco kaj amo — Premio de la grupo «Paco kaj Amo».*

Pretendis la premion kvar verkoj kiujn ni kribris kun atento. La verko kiu restis sur la kribriĵo estas tiu kun n-ro. 44, devizita «Kiu amas sian kunhomon amas Dion» tre bonstila verko kun malprecizaj flankoj ĉe l' enhavo. Ĝin verkis S-ino **Emma L. Osmond** el London (Anglujo).

Estas kreataj du mencioj por laŭri la bonan intencon de la aŭtoroj de sama nombro da verkoj kiuj prezentas iajn bonajn kvalitojn. Ni ilin disdonas jene:

Unua mencio al n-ro. 96, kun devizo «Multaj idiomoj: milito! unu lingvo: paco!» verkita de S-ro. **A. Posener** el Berchem (Belgujo).

Dua mencio al n-ro. 57, devizo «Por la bono ne ekzistas nacia limo» sendita de S-ro. **Hans Windisch-Sartowsky** el Berlin (Germanujo).



XXIV.—*Esperanto kaj Radiofono.*—*Premio de la grupo «Ĝerona Espero».*

Prezentigis du verkoj kun aspiro al la sukceso. Ili havas preskaŭ saman valoron, ĉar dum unu raportas kun serĉitaj faktoj kaj detaloj, la alia pritraktas la temon sub filozofia vidpunkto. Konsiderinte ke tiu ĉi lasta superas la unuan pro sia karaktero ni aljuĝas al ĝi la premion. Ĝi estas la verko n-ro. 78, kun devizo «Radio per Esperanto» kaj ĝia aŭtoro: **S-ro. E. Aisberb** el Parizo (Francujo).

Ricevas mencion la alia verko n-ro. 110, devizita «Per flugiloj de subtila etero...» kiu donas sufiĉajn detalojn pri la proponita temo. Verkinto: **S-ro. Angel Valdepeñas** el Barcelona.

XXV-XXVI-XXVII — *Originalaj prozaĵoj (3.<sup>a</sup> grupo).*

Konsistigas tiun ĉi grupon tri verkoj kun tri premioj aljuĝotaj. Ĉiuj estas bonaj literaturaĵoj kiuj venas riĉigi nian literaturon; sed la verko n-ro. 24, kun devizo «Mieux vaut tard que jamais» montras pli vastan laboron kaj sukcesas kun amuzo kaj lerteco alveni al la solvo de la argumento projektita de la aŭtoro. Konsiderinte ĝian meriton oni havigas al ĝi la du premiojn XXV kaj XXVI de S-roj. **Ivan H. Krestanoff** kaj **Narcis Massagué** Verkinto: **S-ro. K. Saarov** el Leningrado (Rusujo).

La premion XXVII de la grupo «Lumon» oni aljuĝas al la verko n-ro. 105, devizita «Ruzo» kiu estas facila rakonto verkita kun la flua stilo al kiu nin kutimigis la produktema talento de S-ro. **Jakobo Schmid** el Bern (Svisujo).

Mencion meritas la n-ro. 51 devizo «Vian miron fabeligu» pro ĝia korekteco kaj agrabla fabela enhavo. Estas ĝia verkinto: **S-ro. Edouard Jung** el Strasbourg (Francujo).

XXVIII—*Tradukitaj versaĵoj (3.<sup>a</sup> grupo) Premio de «Agrikultura Sindikato».*

Sub tiun ĉi temon venis sin ŝirmi ok verkoj preskaŭ ĉiuj rimarkindaj, tiel pro la boneco de la traduko kiel pro la fameco de la aŭtoroj elektitaj. Estis vera malfacileco profunde juĝi pri la kvalitoj de la tradukoj kaj pri la eminenteco de la originaloj. Sed post daŭra atentado ni konsideris ke tri manuskriptoj povus indi la premion. Limigita nia laboro al tiuj ĉi tri verkoj, ni juĝis pli grava laŭ ĉiuj vidpunktoj la verkon n-ro. 23, devizo «Tragedio» majstra traduko el la tria sceno de la tria akto el la verko de Shakespeare «Otello, la maŭro de Venecio» kaj ni aljuĝis al ĝi la premion. La aŭtoro de tiu verko estas F-ino **Louise Briggs** el Leeds (Anglujo).

Puŝas en merito tiun verkon, kaj ĝin oni mencias unuavice, la n-ro. 18, kun devizo «Merlin» kiu faras brilantan tradukon el parto de «La alveno de Arturo» de Tennyson. Estas ankaŭ aŭtoro de tiu traduko F-ino **Louise Briggs**.

Al la verko n-ro. 97, devizita kaj titolita «Hanibalo kaj Scipiono» oni

aljuĝas duan mencion. Ĝi estas drama sceno el la verko de sama nomo de Franz Grillparzer, vige tradukita de S-ro. Profesoro **Adolf Hainschegg** el Graz (Aŭstrujo).

Trian mencion oni aljuĝas al la verko n-ro. 6 kun devizo «Amiko fide-la trezoro plej bela» korekta traduko de la versaĵo «Hektoro adiaŭas Andromahon» el Schiller, ŝuldita al la inteligenta plumo de S-ro. **Boucon** el Annecy (Francujo).

Estas aljuĝita kvara mencio al la verko n-ro. 6, kun devizo «Mi riskis ĝin» traduko de poemo el la germana lingvo kiu spegulas ne tre flekseble la originalon kaj montriĝas kun ia rigideco kaŭzita de postuloj ĉe la rimado. Aŭtoro: S-ro. **Harmann Steding** el Bremen (Germanujo).

Kvina mencio estas aljuĝata al la verko n-ro. 111 sub devizo «En la mondon venis nova sento» traduko el la baska lingvo farita de F-ino **Amàlia Núñez Dubús** el Pamplona.

XXIX. — *Originata aŭ tradukita scienca studo pri la eltrovo de la Radioj X. (Roentgenologio) Premio de D-ro. Ramon Torres i Carreres:*

Konkursis la diritan temon du verkoj: unu originala disvolvas kun sufiĉeco da pruvoj la demandon, ĝi atingas la premion. Ĝi estas la n-ro. 124 sub devizo «Atakema» kaj ĝia verkinto: S-ro. **Hans Tomczak** el Charlottenburg (Germanujo).

Al la tradukita verko ni rezervas mencion ĉar ĝi interese komentarias pri la afero. Ĝia n-ro. 95 kaj devizo «Ĉiam antaŭen-Zaaz» kaŝas la tradukaŭtoron kiu estas S-ino **Wecker-Eckert** el Saaz (Ĉeĥoslovakujo).

XXX. — *Tradukitaj prozaĵoj (2.<sup>a</sup> grupo) Premio de D-ro. Sennomulo.*

El la verkoj enhavataj en tiu ĉi grupo fariĝas rimarkinda la verko n-ro 17 sub devizo «Vojaĝanto» senpeka traduko el la angla lingvo elfinita de la lerta plumo de F-ino **Louise Briggs** el Leeds (Anglujo).

Indas unuan mencion la verko n-ro. 99, traduko de du ĉapitroj el romano de **Paul Busson** sukcese farita de Profesoro **Adolf Hainschegg** el Graz (Aŭstrujo).

Duan mencion forĝajnas la verko n-ro. 74, kun devizo «La okuloj perfidas la animon, sed ne ĉiu scias en ili legi» impresa rakonto bone tradukita el la pola lingvo, de S-ro. **Edward Wiesenfeld** el Varsovio (Polujo).

Estas aljuĝata tria mencio al la verko n-ro. 88, devizita «Glis», facila traduko el «Psalms of the West» verkita de F-ino. **F. M. Bartholomew** el Letchworth (Anglujo).

Kaj kvaran mencion meritas la verko n-ro. 121, devizo «Paŝo post paŝo» titolita «Adigaj proverboj» kiu kolektas aron da proverboj el Adigujo, vere interesaj. Aŭtoro: S-ro. **P. Stojan** el Genève (Svisujo).

XXXI. — *Kio estas kaj kiel efikas la spiritaĵoj de Sta. Ignaco de Lojola kaj la koncerna gvidado de Pastro Vallet de Katalunujo. — Premio de S-ro. Esteve Rossell.*

La sola verko ricevita por tiu ĉi temo havas la sufiĉajn meritojn por atingi la premion ĉar ĝi donas rimarkindajn detalojn pri la organizo de tiaj ekzercoj kaj komentarias ilian efikon en konvena formo. La verko estas numerita per n-ro. 79, devizita «Memorare novissima tua...» kaj ĝin verkis: Pastro **Joan Font Giralt** el Banyoles.

XXXII-XXXIII. — *Tradukitaj prozaĵoj (3.<sup>a</sup> grupo).*

Kvin verkojn ni envicigis sub tiu ĉi temo el kiuj fariĝas nepre premiinda la verko n-ro. 109 surhavanta la devizon «Tales of the Crusaders» superbela traduko el la dua ĉapitro de «La Talismano» de Walter Scott kiun ellaboris en vibranta prozo S-ro. **Marian Solà** el Terrassa. Al ĝi ni destinas la XXXIII premio de S-ro. **Joaquim Trias**.

Du verkoj hezigitis nin por la aljuĝo de la alia premio XXXIII de S-ro. **Francesc Trias**. Ambaŭ ili havas proksimuman meriton. Ni opiniis, tamen, pli inda la verkon n-ro. 120, devizita «Ni hi són tots els que ho són, ni ho són tots els que hi són» kiu estas tre ĝusta traduko el la kataluna lingvo, kaj ni aljuĝis al ĝi tiun premion. Aŭtoro: S-ro. **Delfi Dalmau** el Barcelona.

Al alia verko interluktanta kun la esprimita, t. e. la n-ro. 100, sub devizo kaj titolo «En la sankta nokto», ni aljuĝas unuan mencion pro ĝia korekteco kaj boneco de l' enhavo. Aŭtoro: S-ro. Profero **Adolf Haischegg** el Graz (Aŭstrujo).

Dua mencio estas atingita de la verko n-ro. 133, devizita «Vintra suno», speco de fabelo pri Kristnasko, tradukita el la germana lingvo de D-ro. **Phil. Wolfzernoz Bielher** el Graz (Aŭstrujo).

La verkon n-ro. 89, sub devizo «Kio estas la plej dolĉa? La Dormo» ni distingas per tria mencio. Ĝi estas beleta prozaĵo kiun tradukis el la hebrea lingvo S-ro. **Edward Wiesenfeld** el Varsovio.

XXXIV. — *Studoj diversaj — Premio de S-ro. Esteve Monegal.*

Estas aparte interesaj la ses verkoj ricevitaĵ kiujn ni kunigis por konkursi la cititan grupon. Ili ĉiuj ĝuas bonan stilon kaj fariĝas indaj je distingo. Sed la Juĝantaro zorge pesis ilian meriton kaj opiniis ke la verko kapabla ricevi la premion estas tiu kun n-ro. 37, devizo «Lingvo estas fosilia historio», profunda studo pri la literaturo kaj lingvo de Irlando, kiun priverkis S-ino. **Emma L. Osmond** el London (Anglujo). Al ĝi, do, ni donas la premion.

Ricevas unuan mencion la verko n-ro 81, kun devizo «Kiu deziras efikon tiu uzu rimedon» bonega studo farita de F-ino **Helena Hempel** el Lwow (Polujo).

Dua mencio estas aljuĝita al la verko n-ro. 28, sub devizo «Modesta konsilanto» kiun sendis al la konkurso S-ro. **Ivan H. Krestanoff** el **Pirdop** (Bulgarujo).

Oni aljuĝas trian mencion al la verko n-ro. 102, devizo «Babilado» flua studo verkita de S-ro. **Jakobo Schmid** el **Bern** (Svisujo).

Meritas kvaran mencion la verko n-ro. 122, surhavanta la devizon «La bonuloj estas ĉiam la gajuloj krom pro malbonŝanco» ŝuldita al S-ino. **Emma L. Osmond**.

Kaj kvinan mencion ni liveras al la verko n-ro. 65 devizita «Malsaĝulo» sendita de F-ino **E. B. Ireland** el **Hove, Sussex** (Anglujo).

Finiĝis jam la raporto pri la verkoj distingitaj en la XII-aj Floraj Ludoj. Kiel vi vidis, la kolekto estis abunda kaj bonkvalita kiel korespondas al la laboro kaj graveco de nia institucio. Sed la tasko de la Juĝantaro ĉiufoje plipeziĝas per la kresko de la nombro da verkoj konkursantaj kaj de ilia pligrandiĝanta vasteco. Kaj la tempo por traĵuĝo ne vastiĝas en konvena proporcio tiamaniere ke la Juĝantaro povu dediĉi sufiĉan tempon al ĉiu verko ricevita. Pri tiu punkto estas necese insisti por ke, estonte, oni disponu almenaŭ duoblan tempon ol nun, per kiu oni plenumos pli ĝustan kaj elfinitan laboron.

Kaj nun, gesinjoroj, mian lastan kaj tradician vorton: Dankon!

Oni trovu eutenita en tiu profunda vorto la tutan esprimforton el nia sincera animo por ĉiuj kiuj iamaniere ne ŝparis sian helpon al la sukceso de la Floraj Ludoj: Al la malavaraj donacintoj de premioj; al la konkursintoj, premiitoj kaj ne premiitoj, unuaj kontribuintoj al la efektivigo de la Festo, al niaj eksterlandaj kunjuĝintoj, D-ro. **Edmond Privat**, nia kara Prezidanto, kaj S-ro. **Josep Berger**, kies mirindan taskon en la juĝado de la verkoj mi ne scias kiel pli bone taksi, al la organizintoj de tia brilanta solenaĵo kies rememoron ni konservos kiel unu el la plej belaj faktoj dum nia vivo; al nia superbela Reĝino kaj ravanta Kortego per kies ĝentileco kaj lumelradianta entroniĝado, ili sciis doni al sia simbola posteno la altan signifon de majesteco kiu ĝin koncernas; al la premiita poeto kiu el malproksime bonvolis vojaĝi ĉi tien por partopreni nian entuziasmon kaj doni reliefon al la okazaĵo; al la distingindaj aŭtoritatuloj el tiu ĉi nobla urbo kiuj honorigis nin per sia afabla ĉeesto, kaj fine, al vi, gastama popolo el Sankta Coloma, kiu montris vian gradon de idealeco veninte ĉi tien kuraĝigi per aplaŭdoj niajn triumfintojn kaj varmiĝi en la ideala fajraĵo de komuna elasta lingvo sonoranta plej delikate sur la refaldojn de ĉies koroj kiel amfrapeto invitanta al nova vivo kiu forigos ĉiajn malkomprenojn kaj ŝanĝos la mondon en pli perfektan larmonvalon.

JOSEP VENTURA

Ĉiuj aŭtoroj aŭ reprezentantoj, kiam nomataj de la Sekretario, alpaŝas al la Reĝino ricevi de ŝia mano la respektivan premion ĵus enmanigitan al ŝi de paĝio. Kelkaj premiitaj verkoj estas legataj de la koncerna

aŭtoro tuj post ricevo de la premio. Per aplaŭdoj la publiko esprimas simpatian al la premiitoj kaj al la Sekretario.

Fine la prezidanto de K. E. F. klarigas kaj laŭdas la verkaĵojn de D-ro. Ed. Privat, Prezidanto de la Juĝintaro de XII-aj Floraj Ludoj, senditan kiel paroladon por la Florluda Festo. Jen la

## Saluto de la Prezidanto de la Floraj Ludoj

### Karaj ĉeestantoj:

La Floraj Ludoj katalunaj! Kiom da belaj rememoroj ili vokas. Kiom da ĝojo kaj poezio! Kiom da nobla entuziasmo! Antaŭ dek sep jaroj en 1909 ankaŭ la subskribinto partoprenis en ili kaj venis ricevi de la Reĝino Sinjorino Marie Hankel la premion por poemo, kiun li devis laŭtlegi.

Tiu Reĝino havis grizajn harojn. Ŝi nun havas blankajn. Ni ĉiuj dankememoras pri ŝia bela talento kaj homa amindeco. Al la Reĝino de la nunaj Ludoj mi deziras la longan feliĉon kaj saman ĝojigan rememoron pri la hodiaŭa tago kiel neforgesebla floro en la ĝardeno de l' vivo.

Per tiu ĉi literatura festo vi ligas la pasintecojn kun la estonteco en belega maniero. La Floraj Ludoj estas antikva ĉarma tradicio. Ĝi kantas pri via riĉa kulkuro. Ĝi simbolas la vivan spiriton kaj artan guston de via nobla popolo kataluna. Samtempe ĝi ornamas nun per novaj kreaĵoj la lingvon de l' espero, la komunan ligilon inter ĉiuj popoloj, grandaj kaj malgrandaj.

Nenie pli bone aŭ pli trafe ol en via bela lando oni sukcesis mortigi la kalumnian asertaĵon ke esperanto malfavoras naciajn kulturojn. Per la «Kataluna Antologio» vi donis al la mondo la rimedojn eklerni pri via nacia literaturo ĝuste pere de nia internacia helplingvo. Per la Floraj Ludoj vi ebligas nian komunan literaturon plikreski en tuta mondo per varma brilo de la kataluna suno.

Via festo parolas al homaj koroj pri sankta harmonio kaj egaleco inter ĉiuj gentoj de la homaro. Tie, sur via tero, vi saĝe kulturas tiun duoblan amon, kiu devos iam esti regulo por ĉiuj homoj: amon al via bela lingvo, parolanta al koroj pri la hejmo, pri la infaneco, pri la patrino dorlotado, pri la juneco kaj arda fervoro, pri la karaj vivantoj kaj la karaj mortintoj, kushantaj pace en tombejoj de viaj vilaĝoj, pri ĉio granda, kiun katalunoj faris kaj faros ankoraŭ, unuvorte pri viaj glorioj, viaj suferoj kaj viaj fervoraj aspiroj; amon al nia komuna Esperanto, la lingvo pura je ĉiu intergenta batalo, la lingvo de l' sopiro homara al pli justa, pli egala, pli frata interrilato de popoloj unuj kun la aliaj.

Per tiu duobla amo vi staras fiere kaj solide kiel nobla kverko kun fortaj radikoj en la riĉa nutra tero kaj delikataj verdaj folioj altiĝantaj al ĉielo.

En la nomo de l' esperantistaro mi dankas al vi pro viaj Floraj Ludoj. Ili estas valora helpilo al riĉigo kaj progresigo de nia lingvo per la vojo de l' naturo kaj gusto. Gratulon al ĉiuj sukcesintoj. Saluton al ĉiuj ĉeestantoj. Vivu kataluna bongusto kaj esperantista frateco!

EDMOND PRIVAT

## Dua Kongrestago.

24 de majo

Je la 8-a. multaj kongresanoj troviĝas en preĝejo St. Sebastia kie okazas meso speciala por la esperantistoj kaj esperanta prediko. La predikanto, Dro. Johano Font, tre korekte kaj bele disvolvas la predikon, kiu forte altiras la atenton de la aŭskultantoj pro la altaj pensoj kaj bele trafitaj argumentoj. Oni povas aserti, ke la prediko de Dro. Font estas modelo, ne nur pro la koncepto sed ankaŭ pro la ĝusta elparolado kaj gramatika korekteco.

## LABORA KAJ FERMA KUNSIDOJ

Je la 10-a. la bela kunsido de la Urbdomo estas plena de kongresanoj.

Sro. Dalmau malfermas la kunsidon je la 10. 15. Oni elektas Sron. Josep Alberich kongresa sekretario.

S-ro. Herp raportas pri la agado de K. E. F. dum la interkongresa jaro kaj precipe detalias la financon situacion. Ambaŭ aspektoj de lia raporto meritas la aprobon de la kongresanoj.

Oni aprobas la elekton de delegitoj en diversaj urboj por pli rapide eukasigi la kotizaĵojn kaj abonojn. Tiu rimarkinda malfruo de la membroj kaj abonantoj kaŭzas ĉiam malhelpon al la Federacio. Sro. Bofill proponas kaj oni aprobas, ke nia organo publikigu la liston de la delegitoj.

Sro. Casanovas proponas ke la Federacio organizu konkurson kun premio por havigi al nia kaso profiton el la kotizaĵoj, kiujn oni devus fiksi por partopreni la konkurson. Kelkaj kongresanoj partoprenas la diskuton kaj oni ne aprobas la proponon, kiu, ŝajne, ne povus havi sukceson.

Sro. S. Alberich, en la nomo de la iniciatintoj de Kataluna Esperanto-Instituto, detale priskribas la celon de la iniciatintoj kaj la kaŭzojn, kiuj konsilas la starigon de la Instituto. La matureco atingita de nia kataluna lingvo kaj la fikseco gramatika al kiu alvenis la rapida evoluo de nia lingvo devigas nin havigi al la lernantoj pli modernajn lernolibrojn. Krom tio la novaj metodoj de pedagogio starigas la materialon, kiun ni havas hodiaŭ, je tre malalta nivelo. La K. E. I. ne nur solvos tiujn du ĉefajn aspektojn, sed aŭkaŭ okupiĝos pri la propagandiloj necesaj en la nuna epoko. La Instituto havigos al si la materialon kaj sistemon de la Komitato por Kataluna Antologio por daŭrigi la sukcesan vojon.

Dro. Bremon faras kelkajn rimarkojn kaj akcentigas la gradon de respondeco, kiu postulas la eldono de novaj vortaroj kaj gramatikoj, precipe el financa vidpunkto. Li opinias ke la verkoj de Sro. Pujulà ne farigis tiel malnovaj kaj ke ilia reeldono kun la necesaj sintaksaj kaj ortografiaj reformoj povus doni ankoraŭ kontentigan rezultaton.

Prof. Dalmau opinias, ke nova eldono nepre devus esti sub la postuloj

de la hodiaŭa kataluna lingvo kaj ankaŭ akorde kun la nova pedagogio kaj pliriĉiĝo de Esperanto. Pro tio li subtenas la celon de la iniciatintoj de la Instituto, ke oni verku novajn gramatikojn kaj vortaron kaj, se tio fakte ne estas ebla, ke Sro. Pujulà kompletigu siajn verkojn laŭ la necesa grado.

Sro. Alberich klarigas ke la Instituto neniam forgesos la gravecon de la entrepreno kaj pro tio ĝi ĉiam konsiliĝos kun la koncernuloj antaŭ ol ĝi entreprenos iun gravan paŝon.

La Kongreso kun ĝojo salutas la baldaŭan starigon de la Instituto kaj promesas al ĝi sian helpon.

Sro. Capdevila, kasisto de Komitato pro Kataluna Antologio, raportas pri la brila sukceso de la entrepreno. En la daŭro de tiel mallonga tempo oni disvendis tra la tuta mondo 375 ekzemplerojn ĉirkaŭe. La verko trovis nur laŭdojn kaj hodiaŭ la beleco de nia patra lingvo estas ĝuata en la vasta Esperantujo. Li anoncas ke al la akciuoj oni povas repagi la 40% de la akcioj.

Sro. Bofill proponas ke la balearaj samideanoj havu sian reprezentanton en la komitato de K. E. F. Oni iom diskutas pri la maloportuneco de rilatoj inter komitatanoj el diversaj urboj kaj fine oni unuanime aprobas, ke la balearanoj havu du lokojn en la komitato.

Oni longe diskutas pri la reorganizo de la Konservantaro de la Floraj Ludoj por fine veni al la konkludo ke ĉio restu kiel ĝis nun.

Sro. Teo Jung, kiun oni invitas por ke li detale klarigu sian proponon aperintan en unu el niaj lastaj numeroj, opinias ke niaj Floraj Ludoj havus apartan allogon por la neesperantista publiko, se la premiita poeto partoprenus ĉiam la Feston de la Poezio. Por tio li proponas ke estonte oni deprenu de la premioj ian procenton por pagi la elspezojn de vojaĝo al la poeto, kiu venus el eksterlando. Se la poeto premiita per la Natura Floro estus enlandano, oni povus konservi la monon por estonta jaro.

La proponanto objekte argumentas sian proponon kaj la kongresanoj komisiis la komitaton de K. E. F., ke ĝi klopodu efektiviĝi la ideon.

Ankaŭ oni komisiis la komitaton atenti la proponon de Sro. Berger kaj efektiviĝi tiujn punktojn, kiuj praktike povas solviĝi.

La prezidanto anoncas la fermon de la kunsido sed ĉar kelkaj kongresanoj esprimas la deziron ke la Ferma Kunsido okazu jam nun por doni liberon al tiuj, kiuj por la posttagmezo havas alian planon, oni daŭrigas la kunsidon post kelkminuta ripozo.

Oni reprenas la kunsidon kaj estas decidade danki Radio Barcelona pro la helpo, kiun ĝi ĉiam donis al nia movado. Ankaŭ oni decidas sendi telegramon al verkisto Vidal i Planes, kiu pro politikaj aferoj estis maliberigita. Oni petas la komitaton ke ĝi esprimu al la familio de nia neforgesebla Gastón, mortinta antaŭ kelka tempo, la esprimon de doloro de la Kongreso pro la malapero de tiel komprenema kaj fervora samideano.

Oni elektas la novajn komitatanojn kaj estas akceptataj unuanime la jenaj kandidatoj: S. Alberich Jofrè, prezidanto, Joan Gill, Jaume Grau, Edu-

ard Capdevila, Jaume Herp, Josep Alberich, Conrad Domènech, Narcís Bofill, Josep Rosselló, Angel Valdepeñas kaj Jaume Prunà.

Neniu invito venis por la Kongreso de 1927. La komitato oni komisiis, ke ĝi prizorgu la elekton de urbo.

La prezidanto fermas la kuusidon kaj Kongreson je la 13.30, esprimante al la Organiza Komitato kaj al la gastama urbo la plej profundan dankon de la kongresanoj.

### EKZAMENOJ

Sub la prezido de profesoroj Solà, Dalmau kaj Alberich (S.) okazas la ekzamenoj, kiujn partoprenas Sroj. Narcís Bofill kaj Conrad Domènech. Post unuhora ekzamenado oni aljuĝas al Sro. Bofill la diplomon de Profesoro kaj al Sro. Domènech tiun de Kapableco.

### VIZITOJ

Apartan intereson havis por la kongresanoj la vizitoj, kiuj okazis posttagmeze al la Kulturdomo kaj Biblioteko. La unua, staranta en la ekstero de la urbo, inter arboj kaj floroj, havas la plej novan materialon por eduki infanojn. Sta. Coloma, malgranda urbo staranta je 9 kilometroj de la plej proksima fervojstacio, havas aspekton de moderna urbo laŭ ĉiuj aspektoj. Oni tuj rimarkas ĉe la alveno, ke la loĝantoj havas ĝenerale altan kulturon kaj la afablecon de veraj katalunoj. La frukto de la Kulturdomo ĉie videbliĝas kaj pri ĝi la Sta Coloma' anoj zorgas kiel pri plej valora juvelo.

La Biblioteko, kreita de Caixa d'Estalvis, superas multajn oficialajn bibliotekojn. Meze de parko ĝi staras, riĉaj ĝardenoj ĉirkaŭas la bellinian dometon, kiu malgraŭ la malgrandeco, enhavas grandan bibliotekon. La legoĉambro, el klasika stilo kataluna, invitas la eniranton al pensado, al la guado de la valoraj libroj atendantaj ĉe la belaj ŝrankoj amikan manon.

Sta. Coloma, vi estas enviinda urbo laŭ ĉiuj vidpunktoj. Vi estas ja urbo pri kiu ĉiu pensas: tiun ĉi urbon mi volus havi kiel naskiĝurbon.

### FESTOJ DIVERSAJ

Honore de la kongresanoj okazis sardanoj kaj balo. Multaj kongresanoj sin fordonis al la ravo de la dancoj kaj estis vera plezuro por la junuloj kaj ankaŭ por nejunuloj admiri la belecon de la enurbaj junulinoj, kiuj ĉiam havis apartan rideton por ni.

Ni menciu ankaŭ la altan valoron de Societo Artistica Farnense, kiu la antaŭan vesperon regalís la kongresanojn per belega kunveno. La ĥoro belege kantis nian himnon kaj harmonie aŭdigis kelkajn katalunajn kantojn.

Ĉiu festo estis tre alloga kaj vera plezuro por la esperantistoj, kiuj havis la feliĉon ĉeesti.

### LASTA VORTO

Pro tio ke malmultaj kongresanoj enskribiĝis por la ekskursoj de la lasta kongrestago oni decidis ne okazigi ilin.



Kiam la aŭtomobiloj forkondukis la kongresanojn oni sentis kiel rapide forglitis la rememorindaj kongrestagoj. Kun la varma adiaŭo ni forportis al niaj respektivaj urboj la konvinkon, ke ni kunvivis en granda harmonio kun la plej fervoraj defendantoj de la Zamenhofa verko. Ni ĉiuj havas la konvinkon ke nia XIII ne estus povinta elekti pli belan lokon por nia ĉiujara festo.

Varma adiaŭado, longaj manpremoj disigis la kongresanojn. Ĝis la XIV.

---

## Principoj de Esperanto

Origino. Gramatiko. Vortaro.

Literaturo. Evoluo.

1925

(Unuafoja publikigo speciale konsentita de la aŭtoro al «Kataluna Esperantisto»).

(daŭrigo)

Ĉiu arĥaismo (malnoviĝa vorto) estas sinonimo por la neologismo kiu ĝin anstataŭas. La arĥaismoj kiuj apartenas al la Fundamento, ne estas forigataj el la vortaroj, eĉ kiam ili foriĝis el la uzado. Oni ilin represigas ĉiam, pro la respekto al la unuaj pioniroj. Tamen ne estus juste konsideri ilin kiel nuran balaston aŭ relikvaron. Iu lerta verkisto povus ilin profiti por skribi en la solena stilo, por kiu la ordinaraĵoj kaj parolturnoj ne konvenas. Tion ni vidas en ĉiu granda kultura lingvo kun antikva tradicio, ekz. en la ĉina, franca, rusa. Laŭ tiu vidpunkto ju pli larĝe ni disvolvos Esperanton, des pli riĉa estos provizo da arĥaismoj, necesaj por la alta stilo.

Esperanto estas preskaŭ matura lingvo en siaj formoj, en la ekstero, sed en la interno ĝi travivas unuan periodon de ŝancela malprecizeco. Unu el plej urgaj taskoj de nuna momento de la Esperanta movado estas preparo de la internacia Fundamento, finlaborita semantike. La egala kaj ĉie la sama kompreno estas esenca kvalito de tiu lingvo, kiu celas klaran interkomprenon. Sed ĝis nun tia interkompreno ne estas garantiita en nia lingvo, kiu estas prezentita malsame ĉe diversaj nacioj. Unu sama radiko estas komprenata tiel en unu lando, kaj aliel en la alia. Nacilingvaj korektoj kaj aldonaj klarigoj, aldonitaj al la Fundamento, pligrandigas konfuzojn kaj senordon. Ne ekzistas por tio alia solvo ol eldono de unika normala Fundamento, redaktita nur en Esperanto. Sur tiu internacia bazo estos verkitaj novaj, pli akorditaj, lerniloj por ĉiuj nacioj, tiam egale profitantaj la novan bazon.

P. STOJAN. L. K.

(daŭrigota)

## Pro... kaj Por...

*Palmira Castellvi*, kiun ni ofte laŭdis pro ŝia kantarto kaj ŝia fervoro por Esperanto, bonege ludis sian rolon en la Esperanta Festo per Radio Barcelona, kaj en Koncerto en Barcelona Teatro Colisseu Pompeia. — Devote al ŝi nian dankemon kaj nian gratulon.

*Chesterton*, la granda paradoksulo de la penso, la eminenta angla literaturisto, estas ankoraŭ pli paradoksa pensulo pri la lingvo internacia. En kuuveno de la P. E. N. Klubo kataluna, antaŭ kelkaj semajnoj okazinta en Barcelona, honore al la angla penklubano Chesterton, okaze de lia vizito kaj kelksemajna gastigado en Katalunujo, tiu paradoksa granda paradoksulo samlandano de Lord Cecil kaj profesoroj Collinson kaj Flügel, parolade diris ke nur homa lingvo internacia povas esti la latina, tial ke nur lingvo per kiu oni povas preĝi kaj blasfemi kaj amindumi povas esti homa lingvo. Niaj anglaj samideanoj estas petataj, kompate al tiu kiu ne scias, evangelie sciigi ke hodiaŭ estas nekonataj latinlingvaj amindumantoj, ke li mem post multjara eminenta praktikado (?) de latina lingvo ne povas tiel facile amindumadi per ĝi kiel per Esperanto simplaj ĉiunaciaj personoj post kelksemajna, foje eĉ post kelktaga simpla lernado de nia internacia lingvo. La universalaj Kongresoj de Esperanto prezentas nekalkuleblajn pruvojn, atestojn, faktojn de nia aserto. — Karaĵ samideanoj samlandanoj de Chesterton, bonvolu nome de la katalunoj sciigi al tiu el via lando kaj lingvo kiu eminente nescias pri afero simpla kaj universala. Evitu ke li dubigu aŭ evidentigu pri lia nesciado. Li diris tiajn sensencaĵojn pri Esperanto al aŭtoroj katalunlingvaj el kies verkaĵoj estas esperantaj tradukoj en la «Kataluna Antologio». La asertoj de la aŭtoro de la *Homo kiu estis Jaŭdo* publikitaj en ĵurnaloj en Barcelona, pensigis al multaj legantoj ke Esperanto estas nekonata afero en Anglujo.

*Nova Sento*. — La *San de la lasta Majo* okazis, ĉe nia Societo, parolado. La salono estis tutplena kaj la ĉeestantaro estis tre bone impresita pro la trafa parolado de nia amiko kaj profesoro S-ro. A. Domènech Mas. — La 10an oni malfermis novan kurson sub la gvido de S-ro. Artur Domènech Mas, kiu dum monato klarigis la plej elementajn partojn de gramatiko. — La 7an de junio li komencis la esperantan kurson kiu estas pleneestata, kaj ĝiaj lecionoj tre fruktodonaj. La novaj lernantoj estas 37.

## Nekrologo

Nia kara amiko Bernard Esparza havis la malfeliĉon perdi sian patron. Tiu ĉi terura doloro, la plej forta kiun povas senti homa koro, nun premas nian bonan amikon. Li akceptu la esprimon de nia profunda kondolenco.

---

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

# KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE  
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto». València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezroj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.

La

## Esperantista Lerneja Servo

serĉas en via lando infanojn kaj gejunulojn, kiuj volas korespondi kun samaĝuloj, en Germanlando. Sciŭ, ke multaj mil infanoj lernas Esperanton en la germanaj lernejoj kaj sopiras korespondadon kun la eksterlando. Tuj skribu al instruisto Richard Pfuetze

Feldstr. 18 FALKENSTEIN I. V.  
Germanlando

## “ORIENT - VOGTLANDA ESPERANTO-LIGO” GERMANLANDO

Ni serĉas hispanajn amikojn por korespondado kun niaj membroj pri iuj problemoj kulturaj kaj internaciaj.

Donu adresojn multajn al:  
Komerĉisto Hans Linke, Falkenstein i.  
V., Germanlando, Ellefelder Str. 37.

# L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), ĩ, ĝ (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

*L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules planes)*

## LA

*artícle determinatiu*

el, els  
la, les

## J

(sona y)

*i es terminació del plural*

faktoj, manoj  
okuloj, animoj

## IN

*sufix per al*

*femení*

heroino, reĝino  
katino, leonino

## O

*terminació substantiu*

lakto  
urbo  
komerco  
(comerç)

## A

*terminació adjectiu*

blanka  
antikva  
komerca  
(comercial)

## I

*terminació verb (infinitiu)*

kompreni  
labori  
komerci  
(comerciar)

## E

*terminació adverbial*

klare  
konstante  
komerce  
(comercialment)

## CONJUGACIÓ DEL VERB

### AS

*temps present*

Mi skribas  
Jo escri

### IS

*temps passat*

skribis  
escrivi

### OS

*temps futur*

ŝkribos  
escriurè

### US

*mode condicional*

skribus  
escriutia

### U

*mode imperatiu o subjunctiu*

skribu  
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

## DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

*Li vidas min.* Ell em veu.  
*Mi vidas lin.* Jo el veig.

*Mi skribas la leteron.* Jo escriu la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

*Al la patro, per la plumo, sur la tablo*